S. AARSE

# NACIISMO KAJ ESPERANTISMO

Broŝurservo de S.A.T.

ĉe

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laùte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1981 * 5 FF

BERGEON J-LUKO

# BERGEON j-L
# esperanto
# nun

S. AARSE

# NACIISMO KAJ ESPERANTISMO

Broŝurservo de S.A.T.

ĉe

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laŭte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1981 * 5 FF

# Antaŭparolo

Ĉi tiu broŝuro estiĝis el diversaj prelegoj kun la sama titolo, sed kiuj traktis la temon pli simple. Montriĝis, ke multaj esperantanoj, tiel en neŭtralaj rondoj, kiel en laboristaj rondoj, neniam funde legis la paroladojn kaj la eseojn de D-ro Zamenhof.

Ni kredas, ke ni en la broŝuro klare montras, ke D-ro Zamenhof rilate la temon "Naciismo kaj Esperantismo" trairis evoluon de la menso, kiel ĉiu serioza pensulo trairas. Ni kredas, ke li en la unuaj kongresoj pro kialoj de takto ne tuj radikale esprimis sin pri la naciismo, sed parolis pri patriamo, al kiu la esperantismo tute ne domaĝos. Li havis antaŭ si tre heziteman, junan movadon, kiu piedpaŝe devis lerni la iradon en fremda, internacia mondo. Ne pli frue ol 1914, ĵus antaŭ la 1-a mondmilito, li radikale esprimis sin kontraŭ la naciismo, en kiu ajn lando aŭ formo.

Jena broŝuro estos eble kialo por sin nomantaj neŭtralaj esperantistoj revizii sian starpunkton kaj konstati, ke la neŭtralismo de D-ro Zamenhof ne plu estas aplikebla en la nuna tempo. La du mondmilitoj radikale renversis la mensojn kaj la moralon de la homoj. Sed jam pli frue dum la Hitlertempo la neŭtralismo montriĝis malsukcesa kiel eduka armilo kontraŭ fanatika naciismo kaj feliĉe D-ro Zamenhof neniam spertis la t.n. "neŭtralan" kongreson en Kolonjo de 1933. Funda studo de la eseoj de D-ro Zamenhof kondukos al mondrigardo, al pensi kaj juĝi monde, al malagnosko de naciaj limoj, al malagnosko de naciistoj kaj naciismo, kiujn principojn transprenis kaj aplikas ĉiam S.A.T. Se tiu broŝuro instigos al funda legado de la paroladoj kaj eseoj de la fondinto de la esperantismo kaj al la konvinko, ke esperantismo, kiel D-ro Zamenhof propagandis ĝin, kaj naciismo ne estas kongrueblaj, ni kredas, ke ni kontribuis al pli klara kompreno pri la rilatoj inter naciismo kaj esperantismo, inter D-ro Zamenhof kaj la tiel nomata neŭtralismo, inter la neŭtrala esperanta movado kaj S.A.T.

La verkinto.

# NACIISMO kaj ESPERANTISMO

Laù la titolo de ĉi tiu broŝuro ni unue provu difini la nocion naciismo kaj sekvi ĝian zigzagan, kapricán vojon inter la ŝtatoj kaj landoj de Eùropo kaj poste ni provu difini la rilatojn de la esperantismo al aù kontraù ĝi, precipe relevante la opiniojn de la fondinto de la esperantismo, d-ro Zamenhof.

Akceptante, ke la naciismo estas la ideologio de unu tuta popolo, forĝita en strikta korseto de iu ŝtatorganizo, tiam supraĵe rigardante la mapon de Eùropo, ni lacîĝas pro la malsamaj traktoj de patrino Eùropo al ĝiaj infanoj, la tiel nomataj sendependaj ŝtatoj kaj ŝtatetoj, landoj kaj popoloj.

La franco Ernest Renan donis en 1882 en la Sorbono prelegon pri la naciismo kaj nacio. Li menciis kiel la plej gravajn faktorojn por la formado de nacio : raso, lingvo, religio, geografia situo, ekonomiaj interesoj kaj fine komuna sorto. Sed la plej gravaj estis por li la geografia situo kaj la lingvo. Kelkaj ekzemploj en Eùropo montras la ŝanceleblon de tiu teorio, malgraù la mencio de diversaj faktoroj.

La belga ŝtato estiĝis pli frue ol unueca germana ŝtato, Belgio havas du lingvojn kaj la germanaj landoj havas unu lingvon. Ekzistas belga ŝtato, sed ne belga nacio, tamen ekzistas konscia belga naciismo kun belga flago kaj nacia belga himno, Belgio havas unu religion kaj Germanio du. Pli nekaptebla en iu ajn difina teorio estas la svisa ekzemplo : unueca ŝtato kun tri lingvoj, kun unu nacia flago, sed ankoraù flirtas 22 flagoj de la pli-malpli memstaraj kantonoj. Ankaù la geografia situo estis tre malfacila por formi nacion, montoj kaùzas malmulte da kontakteblo j. La komenco de la svisa nacio estis la liberigo de 3 kantonoj kun ĝiaj urboj. La urboj iĝis

protestantaj, la arbarkantonoj katolikaj.

La geografia situo de Anglio sugestus, ke en tiu insulo unue en Eŭropo estiĝos nacio kun ŝtato, sed dum longa tempo la regantaj klasoj malŝparis tempon kaj sangon por decidi, kiu urbo estu la ĉefurbo kaj kiu familio okupu la reĝan tronon.

En du landoj frue konstruiĝis formo de ŝtato, Hispanio kaj Francio. La celo de tiuj ŝtatorganizoj estis reguli la ekonomian ĥaoson, kaŭzitan de la mon-ekonomio en la mezepoka sistemo. Unueco de lingvo certe provizore ne estis, sed la fakto, ke Johana d'Ark uzis la terminon "Francio", pruvas, ke ekzistis tiam ĉirkaŭ 1430 iu ĝenerala deziro de landa unueco, precipe pro la invado de la Angloj. Daŭris longe antaŭ ol en Francio la lingvo de la kortego de Parizo estis akceptita de edukitaj rondoj. La deziro al unueco estas pruvita per la fakto, ke Burgundio, kiu plej forte rezistis la kreon de Francio kun unu reĝo, iĝis parto de la nova franca ŝtato en 1477. La Libera Grafejo, ankaŭ posedo de la Habsburgoj,en 1678. Filipo la Bona de Burgundio povis libere kunlabori kun la anglaj malamikoj, nuntempe oni estus nominta lin Filipo la Perfida. Sed en la mensoj de la homoj la vorto kaj nocio "franco" provizore ne estis, oni daŭrigis nomi sin : pikardo, normando, bre-tono, gaskono, provencano. Multaj kamparanoj tute ne sentis sin francoj, la anglaj armeoj estis bonaj klien-toj, ili pagis per valora mono kaj protektis la kampar-anojn kontraŭ franca banditismo. Kun bedaŭro ili vidis la liberiĝon de Francio de sub angla regado.

Por difini la nociojn "nacio" kaj "naciismo" ni devas returniĝi al la pasinto kaj la komenco, ĉar "nacio" kaj "naciismo" estas tute modernaj vortoj. Ili estiĝis ĉ. 1800 en kaj post la franca revolucio. La vortoj "patrio" kaj "patriotismo" estas pli malnovaj. Ili indikas, kie oni devas serĉi la embrion de la naciismo, nome en la agnosko de patra aŭtoritato, en honora memorado de mort-inta prapatro, la fondinto de la tribo, de la grupo, de la klano. Pro tio la vortoj "patrio", "patriamo",estas ŝargitaj de emocio, de sentigaj, karaj memoroj, precipe el la junaĝo. La agnosko, ke la tribo devenas de unu

sama patro, estas trovebla ankaŭ en la senpasia vorto "nacio", kiu signifas "la naskitaro", popolo naskita de unu patro. La vortojn "nacio" kaj "naciismo" oni rigardas objektivaj, sciencaj, senemociaj difinoj, ĉar neniu sukcesos krei same emociajn vortojn el la vorto "nacio", ekzemple "naciama". Similaj rilatoj ekzistas inter la vortoj "patrioto" kaj "patriamanto", la unua tre proksimas al "naciisto". Kiam la francaj amasoj dum la revolucio entuziasme ĵetis sin kontraŭ la konservativaj fortoj de Eŭropo, ilia instiga slogano estis : La patrio estas en danĝero, kaj ne : La nacio estas en danĝero. Ankaŭ la vorto "popolo" estas multe pli malnova ol "nacio", ĝi ankaŭ estas pli emocie ŝargita kaj pli subjektiva ol la vorto "nacio". Ekzistas pli da patriamaj homoj ol da naciistoj. Ni do konstatas, ke la embrio de la nocio naciismo kaj nacio, ambaŭ objektivaj kaj sciencaj, kuŝas en foraj tempoj, konsistante el subkonsciaj memoraĵoj, psikaj kompleksoj kaj traŭmatoj, komunaj al ĉiuj popoloj. La mirantoj pri la subita eksplodo de la 1-a mondmilito forgesis studi la naciismon kiel subkonscian, psikan faktoron, ili neglektis la teoriojn de Freud (frojt). Ili tiam ankaŭ ne estus mirintaj pri la religia karaktero de la naciismo, ke ĝi por la amaso anstataŭas la ekzistantajn tradiciajn kredojn kaj idealismojn.

La solvo de tiu psika procezo kaŝas sin en la emocia vorto "patrio", kiu indikas la subkonscian imagon, komunan al la naciismo kaj al la religio, kiel ni jam menciis: obeo kaj timo al patra aŭtoritato. Tiuj, kiuj surpriziĝis pri la hitlernaciismo kun la hokokruco, la svastiko, neniam profundiĝis en la plej primitivaj formoj de homa socio. La anoj de tribo aŭ klano kredigis sian komunan devenon kaj la komunajn rilatojn de la individuoj per iu mistika signo, ĉu per totemo, ĉu per la memoro pri mita prapatro. Tia signo apelas ankoraŭ en nia moderna socio al la inklino de la homo forlasi kelkan tempon image la sobran, senmistikan realon kaj ŝvebi super tempo kaj spaco. Tiu elemento en la homa spirito vivtenas malnovajn religiojn en moderna, kapitalisma socio, kiu daŭre detruas la idealisman kredon de la religioj, tiu sama inklino esti

en mistika mondo vivtenas ankaŭ la idealismon de la naciismo. La hokokruco estis por multaj eŭropanoj iu blindiga, persvada, forloga signo, kiu kaŝis la materiisman kernon de la naciismo : avido al potenco, nacia egoismo, emo konkeri kaj humiligi aliajn popolojn. La malnovaj triboj aŭ klanoj havis pli da materiismaj motivoj ol da idealismaj, ĉar ili devis batali por la nuda ekzisto. La moderna naciismo estas pli ŝargita de idealismaj motivoj, psikaj motivoj : nacia honoro, nacia ĵaluzo, volo al potenco, deziro al revenĝo. La Hitlera Germanio kovris tiujn elementojn per la bezono de vivo-spaco. Alia elemento, kiu vivtenas la naciismon, estas la inerto de la homa spirito, malgraŭ internacia ekonomio kaj trafiko, malgraŭ la neceso de unuiĝo de Eŭropo, ekonomie kaj politike, la homoj volas senti sin anoj de speciala nacio, malemas cedi lingvon aŭ nomon de la patrio, restas agnoskantoj de ŝtataj limoj kaj nacia emblemo.

Ankaŭ la unuaj marksanoj, Marks kaj Engels, neglektis tiun emon de la homo, ili studis ekonomion, sed ne soci-psikologion, kiu scienco apenaŭ ekzistis tiam. Jam en 1847, multe tro frue, ili sonorigis la mortsignalon por la naciismo en La Komunista Manifesto : "La moderna industrio kreis mondmerkaton, disvastigis senlime la komercon, la martransporton kaj la komunikilojn transtere. La bezono pri konstante ekspansia merkato por ĝiaj produktoj pelas la burĝan klason trans la tutan terglobon." Ambaŭ trotaksis la influon de tekniko sur la homa menso. Marks ekzemple kredis, ke la enkonduko de la fervojoj en Hindion detruos la kastosistemon. Kaj mirinde estas, ke poste tiu internacie organizita burĝa klaso montriĝas la plej konsciaj subtenantoj kaj propagandistoj de la naciismo. La origino de tiu sinteno estas trovebla en la franca revolucio, kiam la tria klaso deklaris sin la veraj reprezentantoj de la nacio kaj post konkero de la potenco nomis sin la Nacia Kunveno.

***

La aŭstra filozofo Ernst Mach (maĥ) avertis nin rilate la uzadon de la lingvo. Li skribis : "En la lingvo ni supraĵe kontentigas nin per agrablaj plaĉaĵoj kaj per plaĉaj agrablaĵoj". Alivorte, ni per la lingvo ne tuŝas la esencon de la aferoj, ni neniam povas precize difini la aferojn, pri kiuj ni parolas, ni uzas kliŝojn kaj kontentigas nin per ili en la ĉiutaga vivo. Tiu danĝero minacas ankaŭ en la traktado de nia temo, naciismo kaj nacio. Ie iu provis difini la nocion naciismo. "Produkto de politikaj, ekonomiaj, sociaj, intelektaj faktoroj en certa momento de la historio, en la menso kaj en la sentoj de la homoj, vivantaj en strikte geografia teritorio kun komuna lingvo kaj literaturo, en kiuj la aspiroj de la nacio estas esprimitaj, ligitaj al komunaj tradicioj kaj kutimoj, honorantaj proprajn heroojn kaj kelkfoje kun komuna religio. Naciismo estas aprobita simbolo, impresa artefarita sento, same artefarita kiel la Panama kanalo".

Supra tiel nomata difino de la naciismo pruvas, kiel malfacila estas tiu difino. Ĝi parolas pri "produkto de intelektaj faktoroj", sed samtempe pri "artefarita kiel la Panama kanalo". Ĝi tute ne mencias, ke en la pratempoj la naciismo regis en alia formo kaj ke psikaj faktoroj ankaŭ helpis formi la bazon, ke patriamo anticipis la naciismon. Ni povas konfesi, ke naciismo estas la artefarita rezulto de la moderna, sendependa, nacia ŝtato, kiu persvadas kaj kredigas, ke oni estas civitano de unu ŝtato kun civitanaj rajtoj, sed prefere pruvebla per pagenda pasporto. Se oni akceptas, ke la moderna naciismo estas artefarita afero, ni konstatas, ke la ŝtato, la moderna ŝtato, havas en sia dispono pli efikajn rimedojn kaj helpilojn ol Johana d'Ark havis : unu oficialan, preskribitan lingvon, gazetojn, radion, televidon kaj precipe la lernejojn. Precipe la histori-libroj estas la

plej grandaj kulpantoj, kiuj tre unuflanke infektas la junajn, facile impreseblajn homojn. Kiel la primitiva tribo aŭ klano gloras nur proprajn agojn, propran karakteron, proprajn heroojn kaj malgloras tiujn samajn aferojn de la malamika tribo, la modernaj histori-libroj per tre unuflanka, nacia prezento de la okazoj faras tutsame, ili havas kiel devigan taskon kredigi la infanojn kaj sugesti al ili, ke propra lando, propra raso, propra popolo, estas la plej inda, la plej valora el ĉiuj. Se oni ankoraŭ trovas tion pardonebla, pli grave mismorale estas veki malican malamon kontraŭ alia nacio, kompreneble post iu malagrabla militkontakto. Se ankoraŭ ekzistas tiaj kondamnindaj libroj, ili estas, konsidere al la idealo de la unuiĝo de Eŭropo kaj de la mondo tute arkaikaj. Bona sanilo kontraŭ tiu infekto estus aŭskulti la 9-an simfonion de Bethoven.

Se oni povas difini la naciismon kiel artefaritan kun la aldono, ke ĝi estas la rezulto de longa intelekta kaj psika evoluo, la korpon en kiu la naciisma ideologio loĝas, la ŝtato, la ŝtaton, oni rajtas certe nomi artefarita, ĉar ĝi formiĝas pro konscia organiza agado de la homo. Kun tiu koncepto oni rigardu la svisan ŝtaton, organizo kun tri malsamaj popoloj kaj lingvoj, kiu tamen kontentige funkcias.

Alia plene artefarita ŝtato estas la belga, iu misfabrikaĵo de Anglio. Dum la Viena Kongreso en 1815 oni decidis denove unuigi la 17 Nederlandojn en unu ŝtato, ankaŭ la anglaj delegitoj plene konsentis pri tiu plano. Kelkaj aliaj delegitoj diris : "Ĝentlemanoj, vi bedaŭros tiun decidon". Kaj Anglio poste bedaŭris, ĉar la aktiva reĝo Vilhelmo de Nederlando progresigis la landon kaj la sudaj nederlandoj posedis grandan teksindustrion. Anglio aĉetis du gazetojn, unu nederlandlingvan kaj unu franclingvan, kiu akre agitis kontraŭ la nova reĝo, kiu ne ĉiam brilis pro takto. En 1831 Eŭropo ekvidis novan sendependan, liberan ŝtaton kun nova reĝo, elektita de Anglio, onklo de la angla reĝino, kiu ricevis la kronon ne sen certaj kondiĉoj. Unu estis : ne esti tiel aktiva kiel la nederlanda reĝo. Ni povas konstati, ke post 1832 okazis granda senlaboreco en la belga teksindustrio.

Sed la senlaboruloj, kiuj salutis la novan reĝon kiel simbolon de nacia libero, havis almenaŭ la kontentigan senton, ke ili liberiĝis de nederlanda tiraneco.

Same artefarita estas la jugo-slava ŝtato, kiu ankaŭ devas transkupoli diversajn, malsamajn naciojn aŭ popolojn. Kroatoj, serboj, makedonoj kaj aliaj nun devas loĝi en unu kadro, sed ne povas forgesi la historiajn okazojn, kiam unu nacio, la plej forta, subpremis la aliajn.

Alia artefarita ŝtato kuŝas trans la maro. Ĝia oficiala nomo estas : La Unuigita Reĝolando kaj Nord-Irlando. Oni inventis komunan nomon por angloj, skotoj, kimroj kaj irlandanoj : nome britoj. Sed se oni renkontas skoton, li iom indigne reagas, se oni nomas lin anglo, ĉar li parolas la anglan lingvon. Li volas akcepti la etiketon brita, sed kun certa fiero li volas esti agnoskata kiel skoto, li emas distingi sin de la Angloj. Ekzistas ankoraŭ kimra kaj skota naciismoj, sed la plimulto vidas, ke sendependa Skotlando aŭ Kimrio estus sensencaĵoj.

Artefarita estas ankaŭ la hispana ŝtato, ĝi enhavas 3 popolojn kaj lingvojn. En la tempo de d-ro Zamenhof la Vaskoj kaj la Katalunoj eble ne aŭdigis sin tiel brue kiel nun, ĉar li skribis : "Franco aŭ Hispano ne komprenus la sengentecon de la tero ; ili kutimas vidi ĉirkaŭ si nur samgentanojn, aŭdi unu lingvon, ili profunde povas kredi, ke lando kaj lingvo kaj religio estas identaj".

Ŝtatoj, kiuj havis la karakteron de popolkolektivo estis la aŭstro-hungara ŝtato kaj la cara Ruslando. La unueco de tiuj estis nur ŝajna. Ilia disrompiĝo okazis preskaŭ unubate. Iom pli pri ili venos poste.

La difininto de la naciismo mencias ankaŭ "unu lingvo kaj unu literaturo". Belgio, Svisio kaj Jugo-Slavio jam montras la eraron. Li mencias ankaŭ "kelkfoje kun komuna religio". Hispanio, Francio, Belgio, Italio, Ruslando kaj la skandinavaj landoj tre proksimas tiun idealon kaj ŝajne ankaŭ Anglio kaj Irlando. Sed Germanio, Svislando kaj precipe Nederlando tute ne. Lastatempe la katolikoj pliiĝis en Svedio kaj Anglio kaj en Irlando la urbestro de Dublin povas esti protestanto.

***

## La marksanoj kaj la naciismo.

La marksanoj ĝenerale subtaksis la forton de la naciismo, ili misjuĝis la influon de la reformismo, kiu ebligis al proletoj vivi en pli bonaj kondiĉoj en la kapitalismo, ili ĝenerale misjuĝis la influon de la lingvo kaj de la naciisma propagando, ili - kaj ne nur ili - ne havis sufiĉe da sociologia kono por konstati, ke la konscio esti membro de pli larĝa komuno - popolkomunon oni false kaj trompe propagandis - levis ĉiun civitanon, ankaŭ la laboristojn super ili mem. Kun idealistaj motivoj ili ankaŭ pretis defendi la ekziston de la tribo. La rezultoestis eksplodo de naciismo kaj de patriamo en 1914, io tute alia ol : "Laboristoj ne havas patrion".

Kiam Lenin aŭdis, ke la germanaj social-demokratoj voĉdonis por la militkreditoj, li kredis, ke tio estas kalumnio. La naciisma idealismo eĉ tiom forte blindigis, ke subpremataj kaj persekutataj popolgrupoj pretis batali por la patrio, kiu tute ne estis patro-lando. En aŭgusto 1914 venis grupo de judoj antaŭ la Vintro-Palaco de la rusa caro, kaj deklaris, ke ili malgraŭ malfacila vivostato pretas defendi la karan patrion.

Marks kaj Engels, malgraŭ sia teorio, ke la kapitalismo ekonomie superis la naciajn limojn, ke do naciismo kiel ideologio estos tute superflua, unufoje estis mem praktikaj naciistoj kaj ne estis tute liberaj de idealista naciismo. Ili verŝajne eksterlande, ekzilite estis tuŝitaj de la sama nostalgia sento de la juda poeto Heine (hajne), kiu en Parizo ne povis forgesi la belan, romantikan Germanion, kvankam li profunde malamis la Germanojn kaj naŭziĝis pri la politikaj kondiĉoj, kio kaŭzis al li multajn sendormajn noktojn. Aŭ kiel la imagoj, kiujn Rikardo Vagner en Parizo havis, ankaŭ ekzilita kaj persekutata, vivante en granda mizero : "Mia belega Germanio, belega germana revo, revo pri

arbaroj, vespere la sonoriloj de la vilaĝturo".

Iun vesperon en Londono gastamaj angloj kritikis Germanion kaj vekis en Marks la patriotismon. Tiam Marks donis laŭdan paroladon pri la arto kaj karaktero de la Germanoj. "Neniu lando produktis tiom grandajn tonpoetojn kiaj Hajdn, Mocart kaj Bethoven, dum la Angloj ne havas muzikon. Momente la Germanoj pro mizeraj politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj ne povas fari grandan praktikan laboron, sed ili en la estonto superos ĉiun alian popolon".

Marks kaj Engels ege suferis pro la mizera dividiteco de Germanio. Ilia nacia konscio faris ilin fajraj propagandistoj de la unuiĝo de Germanio. Tiam iliaj motivoj estis praktikaj. Ili vidis en la ekonomia kaj politika evoluo la neceson de la fondo de sendependa, nacia ŝtato. Iu biografo skribis, ke la ekzilito, la "semito", neniam forgesis sian Germanion kaj sian devon al Germanio. Iu usona gazeto en 1860 riproĉis al li, ke li por usona gazeto sonigis tro germanan tonon, precipe rilate Ruslandon kaj Francion. Tamen Marks ne partoprenis la jubiladon de 1871, por li la prusa junkro Bismark estis objekto de moko. Kiam la nova germana, nacia ŝtato montris, ke ĝi ne estas pli bona ol aliaj liberaj, sendependaj ŝtatoj, montris la saman havemon kaj konkeremon kaj aneksis Alzaco-Lotaringion, Marks fajre malaprobis kaj atakis tiun germanan imperiismon. Rilate la novan Germanion li atendis kapitalisman evoluon kun granda krizo, kiu vekos la klaskonscion de la proletaro. Por la aprobo de la sendependeco de Germanio li ne povis ne aprobi la militon kontraŭ Aŭstrio por liberigi Germanion el la kuratoreco de Aŭstrio. Li aprobis ankaŭ militon kontraŭ Ruslando, sed Bismark estis pli saĝa ol Hitler.

En januaro 1915 s-ro Jozefo Vissarionoviĉ Djugasvili, poste konata per la nomo Stalin, ricevis ordonon de Lenin verki broŝuron pri La Nacia Problemo kaj la Marksismo. Li tiam estis en Vieno kaj kiu iam helpis lin en la verkado ne estas konata, ĉar Stalin ne scipovis la germanan lingvon. Li konstatis, ke naciismo kaj nacio formiĝas en kaj pro burĝa ekonomio kaj per tiel nomataj burĝaj liberoj, per burĝa kulturo, per teatroj kaj gaze-

toj, per libera gazetaro, per edukado en la lernejoj kaj per fondo de aliaj kulturaj institucioj. Tiuj aferoj fortigas la naciajn sentojn. Kaj Stalin ankaŭ estis devigita difini la nocion nacio kaj li trovis la plej larĝan difinon : Komuno de homoj, ĝenerale estiĝinta el malsamaj triboj kaj rasoj.

Li mencias aliajn faktorojn: komunan teritorion, komunan lingvon, komunan ekonomian vivon, komunan psikan staton aŭ komunan karakteron, kaj tre surprize Stalin aldonas : "Se unu el la menciitaj faktoroj mankas, la ideo de nacio finiĝas". Do laŭ li la svisa, belga kaj brita nacioj ne povus ekzisti, skotoj, kimroj kaj irlandanoj kune vivas en la sama lingvo, en la sama kulturo kaj en la sama ekonomio kaj Stalin opinias, ke la popolkaraktero vidiĝas per komuna kulturo. Angloj, skotoj, kimroj kaj irlandanoj iras al la sama teatro por admiri la lingvon de Ŝekspir, sed ekster la teatro ili pretas fari akrajn naciismajn disputojn, ĉar iliaj originaj, naciaj karakteroj ege diferencas.

La faktoro, kiu povus plej kontribui al la formado de nacia karaktero estas : komuna sorto, komuna suferado, komuna subpremado, komuna batalo kaj komuna venko, sed Stalin menciis ilin nenie. Por la verkinto de ĉi tiu broŝuro la karaktero de popolo kaj ĝia formado restas iom nebula kaj malfacile klarigebla afero. Certe loĝas en diversaj nacioj interne grupoj, popolpartoj kun malsamaj karakteroj. Rigardu la nederlandlingvajn Belgojn kaj la franclingvajn. Angloj, la plimulto de la Belgoj kaj la Nederlandanoj devenas ĉiuj de la Germanoj sed evoluis al tute malsamaj popoloj. Malsamaj historioj, malsamaj sociaj evoluoj kaj geografia situo ŝajnas la plej gravaj faktoroj en tiu procezo, sed la karaktero de popolo malgraŭ la mencio de supraj faktoroj restas por la verkinto de ĉi tiu broŝuro kaŝita mistero. Se komuna sorto kaj la historio estas la fortaj faktoroj, tiam la Poloj havas la plej elstaran kaj la plej fortan karakteron kun la plej forta sento de komuneco. Resume, ni devas konstati, ke ankaŭ Stalin ne sukcesis difini klare la nocion nacio. Uzante la vorton "nacio", ni devas provizore kontentigi nin per la "plaĉaj agrablaĵoj kaj agrablaj plaĉaĵoj" de Ernst Maĥ.

Ni jam menciis, ke Marks tro alte taksis la influon de teknikaj faktoroj sur la menso de la homoj, sed rilate Germanion li povis konstati, ke la konstruado de la fervojoj tra Germanio, kiuj estis la nervoj de la nova kapitalismo, multe kontribuis al la praktika ŝtata unuiĝo de la 360 ŝtatoj kaj ŝtatetoj. La konstruado de la fervojoj simple postulis la forviŝon de bremsaj, nenecesaj limoj. Sed apud tio Marks neglektis psikajn faktorojn, tradiciojn kaj entute la inerton de la homa spirito. La ŝtata unuiĝo ankoraŭ ne signifis la unuiĝon de la tute malsamaj germanaj popoloj, kvankam la unueco de lingvo estis.

Marks defendis militon, se ĝi estus necesa por atingi unuecon kaj sendependecon. Por li la sendependa nacia ŝtato estas necesa fazo en la evoluo al la internacia socialismo. Li deziris militon ankaŭ kontraŭ Ruslando, ĉar civilizita lando rajtas ataki kaj militi kontraŭ barbaran landon. El tia milito povas veni nur progreso kaj pli da civilizo, ĉar la barbara lando transprenas iom el la kulturo de la pli civilizita. Tiel li aprobis la militon de Germanio en 1864 kontraŭ Danio kaj por pruvi, ke Danio meritas tiun atakon, li devis pruvi, ke Danio estas barbara lando. Li skribis : "La skandinavaj popoloj havas malpuran, bestan, piratan naciismon, kiu daŭre vivas per ebrieco". Ĉi tie Marks estis makulita de unu trajto de la naciismo : kredi, ke la malamiko estas morale pli malalta.

Se Lenin estus atente sekvinta la eldirojn de la socialdemokrato Bebel, li estus povinta konstati kiomgrade la reformismo kaj la reviziismo de Bernŝtejn estis infektintaj kaj putrigintaj la originan revolucian idealon de la socialismo. En 1880 kiam Bismark deklaris la socialistojn senlandanoj, Bebel diris : "Tamen tiuj senlandanoj pretas defendi sian landon". En 1891 en la kongreso de Erfurt li diris ion, kion ankaŭ Hitler estus povinta poste diri : "Se Ruslando, rifuĝejo de barbaroj kaj kruelaj malamikoj de homa kulturo atakos, ni batalos kontraŭ ĝi". Citante jenajn vortojn, ni kompreneble devas konsideri, ke tiam ekzistis la cara Ruslando. Verŝajne Bebel ĉi tie transprenis la starpunkton de Marks. En 1907 li diris, ke malgraŭ alta aĝo (67), li pretas ŝultri la fusilon. En 1912 li estis konvinkita, ke ĉiu germano marŝos al la franca limo. Ĉi tie ni povas trovi la puran, malsocialistan naciismon. La kialo ĉi tie ne estis

barbarismo. Marks malaprobis la imperiismon de la germana naciismo, sed Bebel akceptis kun ĝojo proponon de Anglio dividi Persion inter Anglio kaj Germanio. Li entuziasme kriis : "Tio solvus pli ol la duonon de niaj sociaj problemoj".

Lenin akceptis senkondiĉe la ne-erarpovon de Engels. Se li estus leginta la tutan Engels, la germana naciismo kaj la agado de la socialdemokrata partio ne estus estinta dolora surprizo por li. En 1892 Engels skribis : "Mi avertas Francion, ke pakto kun Ruslando povas kaŭzi militon kun Germanio kaj tiam la Francoj konstatos, ke ĉiu germana socialisto estos preta defendi sian landon". Do Engels profetis la deziratan militon de Marks. Li profetis ankaŭ la falon de Vilhelmo la 2a : "Se li komencos militon, li detruos sian regnon". En letero de Engels al Bebel kaŝiĝis sin alia averto por Lenin. En 1891 la 13-an de oktobro li skribis : "Se ni estas konvinkitaj, ke milito eksplodos la venantan printempon, ni ne povos voĉdoni kontraŭ militprovizoj. Tiam la armeo proksimiĝas al popolmilico". Jam en 1885, du jarojn post la morto de Marks, li skribis : "Se milito venos, mi esperas, ke mi tiam ankaŭ povos surĉevaliĝi".

Oni ĵus legis la starpunktojn de diversaj marksanoj rilate militon kaj naciismon. La plej seniluziiga estis tiu de Bebel, kiu, estante socialisto kun internacia konscio, proklamis sin propagandisto por germana imperiismo, pensis ekskluzive pri naciaj interesoj. Ne estas iu principa diferenco inter lia vido kaj tiu de la angla imperiisto Cecil Rhodes (rodz). Kun la arogo, ke nur la anglo-saksa raso povas regi la mondon kaj garantii pacon kaj prosperon, li skribis : "La imperio estas afero de la stomako. Ni devas malfermi novajn landojn por enpreni la surpluson de la loĝantaro. Se la laboristoj ne volas civitanmilitón, ili devas iĝi imperiistoj".

* * *

La nomitaj marksanoj Bebel kaj Engels certe atingis sian vizion el la socia praktiko de la laborista movado en Germanio. Engels vizitis Berlinon kaj en 1890 li vidis tute alian proletaron, kiu certe ankoraŭ memoris la persekutadon de Bismark, sed kiu spertis ankaŭ la leviĝon de la vivnivelo, la produktitajn riĉojn de la kapitalismo kaj ke oni laŭ la angla ekzemplo per praktikaj rimedoj povas atingi pli ol per la teoria klasbatalo. La socialistoj sentis sin agnoskitaj membroj de unu tuta ŝtatkomuno, la vorto "senpatriulo" perdis sian koloron, por la novaj generacioj naskitaj post 1890 ĝi estis tute mortinta. Sed ĉi tiu klarigo, ke la homoj ĝoje pretas eniri militon kaj oferi sin, cedi ĉian komforton kaj hejman feliĉon, ne sufiĉas por komprenigi la sovaĝan entuziasmon de 1914. Kio mankis al ĉiu studanto de sociaj fenomenoj antaŭ tiu jaro, ankaŭ al la marksanoj, tio estis socipsikologia kono. Nek Marks, nek Bebel aŭ Engels posedis ĝin.

Oni bazis sin nur sur ŝajne simplaj faktoj el la pasinto. Tiam estis tute nature, ke homoj defendis la materiajn interesojn de la hejmo, de tribo, de vilaĝo, de urbo, de ŝtateto kaj entuziasme sekvis ian standardon kun speciala signo, emblemo, ofte iu totembesto kaj en 1914 la amasoj flugis kiel muŝoj al flama nacia flago por sekvi iun mistikan idealon, defendi la patrion, por defendi la materiajn interesojn, la posedon de kolonioj, dum la ekonomio jam estas evoluinta al internacia komplikeco kaj se la sloganoj nacio aŭ patrio ne sufiĉe efikus, oni aldonas defendon de la demokratio aŭ de la libero por kamufli la interesojn de la internacia kapitalo. Lertaj politikistoj eluzas la emociajn, idealismajn sentojn de la amasoj, kiuj tute ne havas internaciajn, ekonomiajn interesojn. La amasoj tute ne konscias, ke la kapitalo tute ne havas patrion, la ekonomiaj regantoj lasas la amon al la patrio al la malriĉaj amasoj.

Ankaŭ la marksano Trocki vidis kun surprizo en 1914 la entuziasmajn amasojn marŝantajn tra la stratoj de Vieno kaj kun sagaco divenis la motivon, la kialon por ĝoje eniri la militon kaj des pli granda estis lia surprizo, ne nur ĉar li vidis aŭstrojn, sed ankaŭ hungarojn, judojn,

ĉeĥojn kaj aliajn naciojn de la Danubo-Monarĥio. Li skribis : "Ĉu la nacia ideo ? Sed Aŭstro-Hungario estas simple pura neado de iu ajn nacia ideo. Ne, la alarmo de la mobilizado saltas en iliajn vivojn kiel promeso, vivojn, kiuj pasas en monotoneco de senespereco". Krom naciisma propagando regas aliaj psikaj faktoroj, kiuj forlogas la homojn facile adaptiĝi al militsituo, eĉ kun la sento de liberiĝo la nacia konscio estas subtenata de psikaj kompleksoj kaj subkonsciaj animbildoj. Ekzistas diversaj naciaj himnoj, sed nur unu malkaŝas iom la grandan forlogan efikon, kion teksto kaj muziko povas havi. En 1793 la franca revolucio kaj ankaŭ la patrio estis en granda danĝero kaj fajra kanto kaj muziko naskiĝis : la Marseljezo.

La unua linio jam nerezisteble forlogas, invitas kaj persvadas : "Infanoj de la patrio". En la amaspsikozo de milito la individuo denove iĝas infano, li senvole, senpense cedas al granda, imagita, patrina korpo, la nacio, la patrio, la individuo ŝajnas dissolviĝi, forfandiĝi, droni en mistika, senlima, senhorizonta maro. Oni forlasas kun ĝojo la sekuran sorton en la socio, oni preferas vagi al nekonata destino. La imagpovo de la amasoj ĉiam bezonas helpon de videblaj bildoj aŭ figuroj kaj tiel dum la franca revolucio estiĝis la mariana figuro. La sento de liberiĝo, kiu estiĝas ĉe la soldatiĝo, okazas pro la fenomeno, ke la socia hierarĥio subite forfalas kaj ke ĉiu sentas sin egalvaloraj filoj aŭ filinoj de unu familio, de unu patrino.

Jena priskribo de psikaj kompleksoj konjektigus, ke materiaj motivoj tute ne plu ekzistas. Tradukita en Esperanto estas libro de Joana Földes "La Strato de la Fiŝanta Kato", kiu strato vere ekzistas en Parizo. Tie loĝis hungara familio, kiu elmigris al Francio. Iu franco demandis la patron : "Kial vi do pretis batali kaj riski vian vivon por la aŭstra naciismo kaj por via subpremanto ?" Kaj la patro respondis : "Tuj kiam mi estis en uniformo, mi sentis min libera de ĝena libro-tenado kaj kalkulado. Mi havis senpage vestojn kaj manĝon kaj mia edzino regulajn enspezojn". Ĉi tie ni aŭdas sobran, senemocian, senidealisman motivon, ankaŭ sennaciisman, ĉar li ne batalis por kara patrio, eble la flagra promeso de liberigo post la milito iom movis lin.

Milito do estis kaj ankoraŭ estas por multaj liberiĝo el monotona, senaventura, senespera vivo kaj momente kun la destino esti kondamnita porvive al pensio. La modernaj socioj ŝajnas krei tiom da malkontento, malfeliĉo kaj malŝato pri la vivo, aranĝas kaj organizas tiom da sekureco kaj samtempe tiel specialigitan, monotonan laboron, ke multaj homoj, precipe junaj, pretas akcepti vivriskan, danĝeran vojaĝon al tute nekonata destino. Milito ŝajnas malfermi iun fenestron, donantan vidon al pli aventura, pli romantika kaj pli alloga mondo. Ili pretas interŝanĝi la socion kun komplika hierarĥio, kun ekonomia maljusto, kun burokrata subpremado, por mondo, kie regas pli da egalo kaj kamaradeco, kie oni ne vidas okulfrapajn diferencojn de rango kaj klaso. Oni cedas propran disciplinon al komuna disciplino, oni cedas propran kritikan juĝon al komuna juĝo, oni trovas, ke obei estas pli facile ol komandi, oni cedas sian propran individuan respondecon, oni estas libera de la neceso pensi kaj decidi mem, oni preferas la malliberon de la milito super la demokratio kaj libero de la socio, oni preferas la vivon kun solidareco super la burĝa, komforta, egoista vivo en la socio.

Ni donas la vorton al kelkaj pensuloj, psikologoj, kiuj povas diri la aferojn pli science kaj pli bone. La franco Bergson : "Patriotismo estas la nura principo, kiu povas neŭtraligi la inklinon de la socio al disatomiĝo, al detruo de unueco". La germano Rupke : "Milito donas okazon al la amaso, suferanta pro manko de socia kontakto, kontentigi sian soifon al komuneco kaj sinoferemo". La aŭstro Poper : "Naciismo apelas al nia deziro esti libera de la ŝarĝo de individua respondeco". La anglo Huksli : "Por la meza individuo nur emocio faras la vivon vivinda. Enuo estas fonto de morala mizero. Dum milito estas preskaŭ maleble enui".

Strikta marksana edukado eĉ de Lenin ne ŝajnas sufiĉe forta kaj saniga medicinilo kontraŭ infekto de naciismo aŭ patriamo. Nur en la rusa Dumo du frakcioj voĉdonis kontraŭ la militkreditoj, sed en Eŭropo, en Anglio kaj Francio multaj bolŝevikoj, ekzilitaj de la kara patrio, paĉjo Ruslando, anoncis sin por enarmeiĝo por batali kontraŭ la kruelaj Aŭstrio kaj Germanio. Ĉe Lenin restis nur du : Zinovjev kaj Kolontaj en Svisio. La batalpretaj bolŝevikoj

verŝajne ne konsciis, ke ili vole batalis ankaŭ por franca kaj angla imperiismoj.

***

## Naciismo kiel faktoro de progreso.

Malgraŭ scienco kaj racionalismo, kiuj devigas la homon vidi kaj kolekti la faktojn kaj pensi kiel eble plej logike, la homo ankoraŭ emas nutri kaj okupi sian spiriton per malraciaj, romantikaj kaj eĉ per mistikaj imagoj, kiuj falskoloras por li la nudan, palpeblan mondon. Peco de kolorita kotono ne plu estas tuko, io materia, sed iĝas io spirita, io abstrakta, por kiu oni pretas oferi sian vivon, la figuro sur ĝi iĝas amata simbolo de la kara patrio. La oficiala nacia himno, ofte kanto kun monotona, neinspirita melodio, komponaĵo, kiu neniam estus akirinta premion en iu muziklernejo, subite, kantate de amaso, havas pli da magia forto ol komponaĵo de fama tonpoeto kaj levas la nacianojn super ilin mem, levas ilin dum momento al mistika atmosfero super etspiritan kaj bagateleman, ofte malican socian realon plenan de ĵaluzo kaj korupto. Sed la atmosfero de la naciismo estas limigita, la naciismo ne estas universala, ĝi povas esti etspirita, maltolerema kaj same malica kiel la socia realo. Bethoven kaj d-ro Zamenhof levas la homon al pli vasta, pli nobla kaj pli tolerema atmosfero, ĉar ankaŭ la esperantismo bezonas iun mistikan kredon pri la estonto por kredigi la homojn pri la fina venko :"atingi la celon en gloro / promesas sanktan harmonion". Ni estas konvinkitaj, ke la vojo de la homa spirito al plena internacia konscio estos longa vojo de suferoj kaj doloroj, kapitalo kaj trafiko pavimas por ni iom tiun vojon, sed la nacioj aŭ popoloj restas nacie pensantaj kaj juĝantaj, kaj se la esperantismo volas superi tiun konservatismon, ĝi devas eluzi duoble sian forton. En la pasinto la naciismo ankaŭ devis lukti por

la venko, por agnosko, sed kontraŭe al la internaciismo ĝi posedis la avantaĝon de la lingvo, dum la esperantismo estas devigita transgrimpi ankaŭ tiun barieron.

Ni nun provu sekvi la lukton de la naciismo tra la jarcentoj kaj por la historia sinsekvo ni komencas per la Grekoj.

Ĉiu esperantano, ĉu tiel nomata neŭtrala, ĉu SAT-ano, kristana aŭ katolika, ne povas ne agnoski, ke en la pasinto la naciismo estis - kaj ankoraŭ estas - progresiga faktoro en la ekonomia, politika kaj morala evoluo de la homo. Per kunigo de etaj, bebaj, politikaj kaj ekonomiaj unuoj aŭ civitoj, kiuj per si mem ne plu trovis kialon por memstara ekzisto, politike kaj ekonomie, kiuj solaj ne plu kapablis defendi sin kontraŭ danĝero kaj milito, oni kreis pli da unueco, pli da ordo en politika ĥaosa mondo. La kunigo instigis al pli vasta kunlaborado, ĝi malpliigis la nombrojn de malamikaj konkurantoj, ĝi larĝigis kaj vastigis la moralan juĝon, ĝi altigis la kulturan nivelon de la iamaj civitoj, kiuj ofte estis subevoluintaj, precipe la strebado al kaj la neceso de unu komuna lingvo. Tiuj komencaj malgrandaj naciismoj kaj malgrandaj nacioj alportis pli da unueco, kaj pli ankoraŭ, kiam multaj civitoj, multaj urboj, kuniĝis al pli granda komuno, ŝtato aŭ lando.

Kaj jen ni atingas la dramon de la Grekoj, kiuj sentis sin unu popolo, nomis sin Helenoj (Grekoj estas romana vorto) kaj vivis dividite en ĉirkaŭ cent urboj. Per la greka ekzemplo ni povas konstati, ke la kresko al naciismo ne okazis meĥanike, eĉ se la ekstera danĝero, fremda konkeranta nacio, staras antaŭ la pordo. Inerto kaj konservatismo de la homa spirito ofte estas pli fortaj. Ĉe la Grekoj ni konstatas, ke la homa spirito povas esti splitita. La Grekoj per sia arto, precipe en Ateno, atingis altan flugon, ili konkeris la tutan mondon per ĝi, iliaj filozofoj superis la infanan naturreligion kaj analizis la naturon kaj la homan penson, ili ankaŭ katenis kaj ankoraŭ katenas la mondon de la intelekto. Kaj apud tiu leviĝo de spirito ni devas konfesi, ke en politiko kaj moralo la Grekoj estis mizeraj misuloj. Unufoje en kvar jaroj ili komune spertis sportkonkuradon, sed post

tio la sportuloj kaŝis sin malantaŭ la muroj de sia civito kaj se oni rigardis trans la murojn, tio okazis kun malica ĵaluzo. Tiuj cent urboj ne povis trovi la absolute necesan unuecon; estis du minacoj, kiuj povis sklavigi la Grekojn, la Persoj kaj Aleksandro. La Grekoj neniam atingis tiun progresigan faktoron, la naciismon. Tio fine detruis la landon en 30-jara milito inter Sparto kaj Ateno. La urbo, kiu pro komerco kaj ŝipnavigado havis la plej larĝan vidon kaj la plej radikalan koncepton pri demokratio kaj libero, estis la viktimo de etspirita moralo pro manko de naciismo.

Provo klarigi tiun kontraŭaĵon en la greka spirito, agla flugo kontraŭ raŭpa rampo, estas certe riska entrepreno. La 100 malgrandajn civitojn, kie okazis la ekonomia, politika kaj morala vivo, ili nomis "polis". Ĝenerale la traduko estas "urbŝtato", sed tio ne estas tute ĝusta. Tiu vorto vekas imagojn pri speco de azia urbo, kie regis potenculoj, aristokratoj kaj prelatoj, aŭ pri okcidenta urbo, kie regis riĉaj burĝoj. Pli bona traduko estas : sinreganta komuno. Ĉiuj viraj liberaj loĝantoj komune regis kaj decidis. Inter la muroj estis propra centro de juro, de religio, de ekonomio, de politiko, de militismo kaj de kulturo. La "polis" estis la loko, kie la junulo kreskis al viro, kie li spertis sian infantempon en kara hejmo, kie li spertis sian unuan amon, kie li akiris siajn rajtojn. La polisanoj estis anime ŝnuritaj per katenoj de emocio al la civito, la polis estis la kara patrio, por kiu la polisano estis preta sin oferi, ĝi vere estis intima hejmo, kiun li pretos defendi kontraŭ malamikoj kaj tiuj estis ĉiuj aliaj urboj aŭ civitoj. Inter la polisanoj regis severa moralo, severaj konceptoj pri virtoj. Spartanoj, Atenanoj kaj Tebanoj estis edukitaj al honesto, sincero, al interestimo kaj humanismo, al interhelpemo kaj interprotektado. Trompo, ŝtelo, kruelo kaj mortigo estis severe punataj, ofte per la morto. Sed tiuj moralaj konceptoj estis aplikataj ĝis la muroj de la urbo. La menciitaj malvirtoj estis permesataj kaj eĉ honorataj, se oni uzis ilin kontraŭ anoj de alia polis. Tiam oni laŭdis la misfarantojn, ĉar tiam en la konscio de la civito tiuj agoj estis pozitivaj, pozitivaj por propra komuno, oni sankciis ilin.

Kiam Sparto batalis kontraŭ la Persoj en la trapasejo Termopiloj, facile estis por la Persoj trovi perfidulon, ĉar tiu ne perfidis sian karan patrion, sed Sparton, kaj Sparto ne estis lia patrio. La polisanoj de la 100 urboj simple ne povis imagi pli larĝan kaj pli altan formon kaj organizon de komuna vivado, ilia vido estis kaptita de etskala ekonomio kaj politiko, ilia imagpovo estis bremsata de rutinaj, tradiciaj vivo-formoj.

Ni kredas, ke la kaŭzoj estas pli materiaj ol spiritaj. Pro la geografiaj cirkonstancoj, pro la manko de vojoj, pro malsekureco ekster la muroj, ne okazis komerco nek interkontakto. La urboj estis devigitaj ekonomie provizi sin mem, estis kiel memstaraj, liberaj kamparanoj, agi kaj vivi egoiste. Escepto estis Ateno, ĉar ĝi kontaktis kun aliaj popoloj, la maro havas liberigan efikon. Sed ankaŭ tiu altstara urbo falis al etspirito kaj etmoralo. Ĝi postulis la plej sagacan kapon de Grekio, nome tiun de Aristoteles, la instruisto de Aleksandro, kaj devigis lin mizere morti en ekzilo. Tragedie, la viro, kiu subtenis la politikon de Aleksandro, kiu volis unuigi la Grekojn, kiu do volis krei ian grekan naciismon, devis fuĝi por savi sian vivon. Li mortis sur malgranda insulo en la Egea Maro. Li fuĝis, ĉar, kiel li diris : "Mi ne volas doni okazon al Ateno duafoje peki kontraŭ la filozofio". La artflugiloj de la Grekoj estis senlimaj, iliaj politikaj flugiloj estis stumpaj. Iliaj tragedioj montras la homon kiel viktimon de subkonsciaj animŝtormoj, de traŭmatoj kaj subkonsciaj kompleksoj, ili konceptis la homon kiel tragikan estulon kaj ne konsciis, ke ili estas tragika popolo pro manko de naciismo. Ili falis en la manojn de Aleksandro kaj de la Romanoj kiel mola frukto.

* * *

La naciismo ne ĉiam estis la firma politika ideologio de unu popolo organizita en ŝtato, do ni scivolas, kiom da vero enhavas la opinio, ke ĝi estas artefarita kiel la Panamo-kanalo.

Rigardante la mapon de Eŭropo kun iom da historia kono pri la diversaj, liberaj, sendependaj popoloj kaj ŝtatoj, neniu povas trovi la fadenon de Ariadna, kiu povas gvidi

al malkaŝo de iu historia leĝo aŭ principo, laŭ kiuj Eŭropo evoluis al la nuna varia, multkolora, politika mozaiko. Iam Eŭropo havis internacian konscion, dum la Mez-Epokoj, vivantan en la Rom-Katolika Eklezio, en la spirita vivo de pastroj, prelatoj, studentoj, klerulоj kaj papoj kun la latina lingvo kiel komunikilo. Por ili Eŭropo ne havis ŝtatajn limojn, ne ekzistis malsamaj popoloj kaj landoj. Se estis limoj, ili striktigis kaj ĉirkaŭis memstarajn farmejojn, nobelejojn, sinjorejojn, regionojn, urbetojn kaj urbojn, kiuj estis tiam la memstaraj ekonomiaj kaj politikaj unuoj, rezultoj de la katastrofa disfalo de la Roma Imperio.

La mezepoka ekonomia sistemo ne produktis, sed kontentigis la unuajn bezonojn, ne kreis iun vendendan surpluson. La enveno de la mono kaŭzis ekonomian ĥaoson, kiun Hispanio kaj Francio provis regi per la organizado de ŝtato kun absoluta aŭtoritato kaj, se ĉe aliaj landoj kaj popoloj la ŝtato longtempe atendigis sin, la kialo povas esti nur, ke en tiuj regionoj kaj teritorioj pro ekonomiaj kaŭzoj longtempe restis pli-malpli mezepokaj kondiĉoj kaj sociaj rilatoj. El tiu disfalo kaj detruo de la mezepoka ekonomio naskiĝis ankaŭ liberaj, memstaraj kamparanoj kaj liberaj, riĉaj burĝoj en urboj, kiuj praktike estis fortikaĵoj. Ili poste formis la spinon de la nacia ŝtato, ne la nobeloj, ili rezistis la absolutan ŝtaton kiel eble plej longtempe.

Repensante pri la gvida fadeno de Ariadna, ni provos trovi iun regulon, leĝon aŭ principon validan por la estiĝo de ĉiu lando aŭ popolo, kaj farante tion, ni surprizite renkontas la plej akrajn kontrastojn kaj malsamaĵojn. Laŭ la jam menciita franco Ernest Renan unu el la plej gravaj faktoroj por la formiĝo de naciismo kaj nacio estas la lingvo, la unueco de lingvo. Ni trovas, ke Francio kun unu preskribita, oficiala lingvo atingis pli frue nacian kaj ŝtatan unuecon ol Germanio, ankaŭ kun unu oficiala lingvo, destinita de 1400 en la kancelario de Prago. En la tiama Ĉeĥio loĝis pli da germanoj ol da ĉeĥoj. La tiama uzado de la germana lingvo por oficialaj proklamoj, aktoj kaj dokumentoj estis la komenco de iu konscia germana lingvo-naciismo. Ekstere Germanio ŝajnas havi nenian naciismon, sed la naciismo estis

dormanta, latenta kaj ne artefarita, ĉar la bazo estis amo al la lingvo, kun kiu oni naskiĝis. La Reformacio estis rezisto ne nur kontraŭ la arogo de pastroj kaj koncilioj, sed ankaŭ kontraŭ la uzado de fremda, nekomprenebla lingvo en la preĝejoj, lingvo el fora, fremda urbo, kiun oni neniam vizitis. Fine multaj germanoj, la edukitaj, volis legi la Biblion en la germana lingvo kaj Luter, kiu donis formon al la germana lingvo, respondis al tiu deziro per sia giganta laboro, la traduko de la Biblio en la germana. Antaŭ la artefarita posta naciismo de Prusio Germanio posedis iun kaŝitan naturan naciismon. Malgraŭ tiu unueco de lingvo, notu bone, lingvo nur por elitanoj, Germanio restis ankoraŭ dividita en 360 ŝtatoj kaj ŝtatetoj. La perdo de la komercvojo, kiu bremsis pluan kapitalistan evoluon kaj disvolviĝon, kaŭzis, ke multaj regionoj, urboj kaj urbetoj ankoraŭ restigis pli-malpli mezepokajn rilatojn kaj ekonomiajn kondiĉojn. Oni ne cerbumis pri la abolo de limoj, pri la abolo de propraj poŝtmarkoj, pri la forigo de doganejoj, pri la malorganizo de gildoj, pri la unueco de mezuro, ĉar tio estas ĝuste la tasko de moderna, kapitalista ŝtato. Oni povus rigardi la 360 ŝtatojn kaj ŝtatetojn kiel pli grandformajn originajn sinjorejojn, nobelejojn, sed ili alprenis pli imponajn nomojn :duklando, graflando kaj eĉ reĝlando.

Ekzistas ankaŭ teorio, ke la naciismo, kiu unuigas unu popolon, estas fruktodona grundo kaj motivo al nacia arto kaj kulturo. Kaj se ni rigardas la pentro-arton kaj la literaturon, nin frapas la surpriza konstato, ke la dividita Germanio atingis pli altajn suprojn de kulturo ol la posta prusa ŝtato. Ni menciu nur nomojn Herder, Klopstok, von Humbolt, Lesing, Goethe (geŭte), Schiller (ŝiler), Bethoven. Pro la nacia mizera stato tiuj pensuloj levis sin al iu internacia konscio. Ilia temo ne estis la nacio sed la homo aŭ la homaro. Goethe konscie rekte kondamnis la naciismon. Laŭ li ĝi estas signo de malalta kulturo. "Estas bone esti bona franco, estas bone esti bona eŭropano, sed pli bone estas esti bona mondcivitano."

Oni ne imagu, ke ĉe la fondo de Germanio kiel ŝtato, ĉiu teritoriano sentis sin germano, ke Frisoj, Rejnland-

anoj, Prusoj kaj Bavaroj akceptis unu la alian. Verŝajne nur la Prusoj sentis sin plene hejme en la nova domo, ĉar la reĝo de Prusio estis la nacia simbolo, la imperiestro. La germana eseisto Martin Valser skribis jenon : "Mia avo en 1870 tute ne sciis, ke li estas germano. Li eniris la militon sub bavariaj flagoj. Mia patro, kiu frekventis mezgradan bavaran lernejon, ankaŭ neniam estus iĝinta konscia germano, se li ne estus havinta sangnacian ekstran lecionon inter 1914 kaj 1918". La konscio esti ano de certa ŝtato postulas longan, psikan kaj ofte doloran procezon. Oni emas konservi dialekton kaj amatan nomon de la loko aŭ regiono, kie oni spertis kaj ĝuis sian junaĝon, tiun lokon la germano nomis la hejmloko, la "heimat" (hajmat) kaj daŭris longan tempon antaŭ ol "heimat" kaj "patrio" samidentiĝis kaj vekis la samajn emociojn.

En Francio estiĝis en la nordo grava kultura kaj politika centro kaj oni proklamas la kortegan lingvon de Parizo oficiala lingvo por publikaj komunikoj, aktoj kaj aliaj politikaj dokumentoj. La konscion, ke komuna unueca lingvo estas bezonata, verŝajne kaŭzis la komerco, kiu uzis la longajn riverojn kiel transportvojojn. Sed de Johana d'Ark al la Marseljezo estis longa vojo. La nocio Francio ekzistis antaŭ la nocio franco. Ni jam notis, ke la loĝantoj de la diversaj regionoj obstine restis uzantaj la nomon de la regiono kaj eĉ en la tempo de la 3 musketistoj d'Artagnan havis grandan penon agnoskigi sin en Parizo, ĉar li estis nur kruda gaskono, al kiu mankis la civilizo de la pariza kortego.

* * *

La anglan lingvon oni rajtas nomi feliĉa edziĝo inter la franca kaj la germana lingvoj. Certe estiĝis frue sur la insulo unueco de lingvo, kiu jam en la tempo de Ŝekspir estis kreskinta al granda rolo. Diversaj faktoroj kontribuis al tio kaj rapidigis la procezon, unue la nobelparlamento, kiu funkciis ĉirkaŭ 1200, kaj kiu devigis nobelojn, prelatojn kaj kelkajn burĝojn kunveni en Londono de foraj regionoj ; due la teatroj, kie vilaĝkomunoj kaj urboj vivis en la sama lingvo, uzata

de aktoroj kaj poetoj kaj precipe la vojaĝantaj aktor-trupoj formis gravan faktoron en tiu procezo.

Malfacile imagebla estas anglo kun flama, maltoleremа naciismo, lia flegmo kontraŭas tion. La minaco de la hispana "Armada" vekis iun flagran nacian senton, oni ne povus nomi ĝin naciismo. Ŝekspir estis inspirita de tio kaj dediĉis kelkajn belajn liniojn al la paradiza insulo, kio en lia falsa imago Anglio estis, kaj li elsputis kelkajn insultajn vortojn al la memoro de Johana d'Ark. Se oni volas kompari, la tiama angla naciismo estas nur flamo de kandelo kaj vera naciismo iu brulanta fajro.

Kiam eksterlandanoj ĉirkaŭ 1650 vizitis Anglion, ili miris pri la bona kvalito de pano, biero kaj viando. Ĉiu anglo tiam povus fiere bati sin sur la brusto, trinkante sian el-bieron kaj fanfaroni, ke ĝi estas farita el hordeo kaj tritiko kreskantaj sur angla tero, li povus montri siajn ledajn botojn kaj fieri, ke ili estas faritaj el la haŭto de anglaj bovinoj, nutritaj per angla herbo, li rajte povus nomi sian matenmanĝon angla matenmanĝo, konsistanta el angla porkaĵo kaj el ovo, kiu falis el angla kokino. Liaj vestoj estis faritaj el lano de ŝafoj paŝtiĝintaj sur anglaj herbejoj aŭ erikejoj, lia tolo por la litkovriloj venis de lino, preparita de angloj. Lia domo estis konstruita el ligno de anglaj arbaroj, la tuta angla insulo povis provizi sin mem. Kiam tiam okazis milito, la tuta ekonomio de Anglio tute trankvile povis plucirkli kiel en tempo de paco, Anglio tiam estis ekonomie tute sendependa lando kaj tamen la tiamaj angloj tute ne esprimis ian nacian fieron pri trinko, ledo, tolo kaj manĝoj, ili simple konsideris tiujn aferojn de propra grundo kiel naturan, memkompreneblan aferon, ili tiam ne estis atingintaj iun naciisman ideologion. Sed nun, kiam Anglio ekonomie tute dependas de aliaj landoj por havigi al si la nutraĵojn, oni parolas pri angla matenmanĝo, sed la necesa fritenda ovo devas fali el kokino, kiu rondkuklas en nederlanda, franca aŭ dana kokinejo kaj la lardo tranĉita venas de porko, kiu grasnutrate rondgruntas en

Nederlando aŭ Danio kaj la teo estas la nacia trinkaĵo, sed nun la ingredientoj por tiu freŝiga fluidaĵo venas de foraj landoj kaj la pano aŭ greno por kompletigi la matenmanĝon aŭ la anglan lunĉon devas atingi la malsatajn londonanojn pere de la havenoj de Antverpeno aŭ Amsterdamo kaj la materialo por la anglaj kostumoj estas importataj el Hindio, Egiptio aŭ Aŭstralio. Kaze de milito Anglio tute dependas de aliaj landoj, precipe de Kanado kaj Usono, tamen oni nun nomas ĝin sendependa lando, nun ekzistas angla naciismo, kun nacia flago kaj nacia himno kaj nacia fiero. Kiel la reganto de imperio ĝi bremsis kaj subpremis la nacian sendependecon de 28 aliaj landoj kaj nacioj. Sed la angla naciismo havas malfortan punkton : ĝi povas rigardi trans la limojn, ĝi distingas sin de la plena naciismo de aliaj, ŝargita de maltoleremo kaj falsa konscio de supereco super aliaj. Angloj povas laŭdi kaj glori la t.n. malamikon. Post la bur-militoj en Sud-Afriko generaloj de Wet, Bota kaj de la Rej devis veni al Londono por la packontrakto. Sur la kajo de Southampton (saŭthempton) staris amaso da homoj, ne por ĵeti koton aŭ ŝtonojn, sed por ĝojkrie glori tiujn simplajn burojn pro la fakto, ke ili dum pli ol du jaroj vere hontigis Anglion. Ankaŭ en Londono ili ricevis ovaciojn, kvazaŭ ili estus 3 anglaj generaloj, kiuj revenis post glora venko. Ĉu oni povus imagi generalon Montgomeri ricevata tiel en Germanio aŭ generalon Ciap de Vjetnamio tiel renkontata en Parizo ? Ni konfesas, ke ĉi tie la komparo ne estas tute aplikebla. Ankaŭ Churchill sporte kaj sincere esprimis sin pri la bur-malamikoj : "Tri anglaj soldatoj estis bezonataj por venkbati unu buron".

Fanatikaj anglaj naciistoj estas nomataj de la Angloj mem "jingoj" kaj eble la Angloj pro sia flegmo tute ne havus ian naciismon, se ili ne estus ĉirkaŭitaj de tri aliaj popoloj : skotoj, kimroj kaj irlandanoj, kiuj kelkfoje per sia naciismo pikas la Anglojn kaj pro tio memorigas ilin, ke ili estas angloj.

La diversaj ŝtatoj de Eŭropo montras kiel la homo kapablas nutri sian spiriton per iluzioj kaj tiel trompi sin mem, ekzemple per la t.n. "nacia sendependeco", dum en la ekonomia kaj politika realo regas totala dependeco.

Imagu Danion sen kupro, nikelo, plumbo, brutarnutro, kakao, bananoj, kafo, teo, fero, fekundiloj, kotono, tabako, ktp. Mi citas Danion, ĉar ĝi posedas nenian krudmaterialon. Tamen dana naciismo ekzistas, ĝi volas distingi sin de la du aliaj skandinavaj landoj, kvankam la bazo de la tri lingvoj estas la sama, kvankam ankaŭ la tri popoloj apartenas al la sama raso. Tute sendependaj landoj kaj certe ne ekonomie ne ekzistas, eĉ Usono kaj Sovetio ne estas tute sendependaj. Malgraŭ tiu iluzio ni vivas en tempo de daŭra kresko kaj estiĝo de sendependaj naciaj ŝtatoj. Du marksanoj, Hilferding kaj Lenin, antaŭvidis la afrikan naciismon. Laŭ ili la popoloj de Afriko pro kapitalista ekspluatado emas por ekonomia kaj kultura liberiĝo fondi la nacian, sendependan ŝtaton, kaj ili konstatis tion jam antaŭ la unua mondmilito. Kaj super tiuj 50 novaj ŝtatoj ŝvebas kiel nebulo la fora idealo de unuiĝo de Afriko.

***

# Strangaj infanoj.

Januaron 1648 panjo Eùropo devis agnoski la naskiĝon de du strangaj infanoj : la Respubliko de la Sep Provincoj, internacie nomata Holanda Respubliko kaj Svisio. La habsburga familio en Hispanio kaj Aùstrio devis cedi la suverenecon super tiuj du malgrandaj landoj. Ambaù landoj nomis sin respublikoj, sed tiu vorto vekas falsajn imagojn. La unua infano ŝajnis moki kaj ridindigi ĉiun tiaman leĝon kaj regulon de politika, ekonomia kaj kultura evoluo. Dum en la resto de la mondo formiĝis ŝtatoj kun centra absoluta regado de imperiestro aù reĝo, la Holanda Respubliko estis tute alia politika fabrikaĵo. Ĝi vere ne estis respubliko, sed malsolida kaj malsolidara federacio de 7 provincoj, dum la veraj regantoj estis la reprezentantoj de 17 urboj, kiuj kiel ĉe la Grekoj tute ne estis liberaj de konkurama ĵaluzo, sed estis devigitaj intime kunlabori pro la hispana danĝero kaj poste pro la franca kaj angla danĝeroj. Kiel anstataùanto de absoluta reĝo venis princo el la Oranĝo-familio, kiu ludis la rolon de centra figuro kaj devis veki la ideon de unueco. Sed la burĝaj reprezentantoj de la urboj tute memdecide kunvenis kaj ne povis esti sendataj hejmen, kio povis okazi al la angla parlamento. La Holanda Respubliko estis tipe burĝa, dum la evoluo la nobeloj perdis preskaù ĉian aùtoritaton kaj havis fine nur unu voĉon en la kunvenoj.

Malgraù la centra figuro mankis unuiga naciismo, urbaj kaj provincaj interesoj kaj egoismo restis. Tio montriĝis, kiam Francio eniris en 1672, urbo post urbo cedis sen batalo al la malamiko. La termino "patrio" ekzistis; precipe la maristoj, kiuj devis riski sian vivon kaj sanon por kapti la koloniajn trezorojn, uzis la vorton.

Lingvo-unueco estis pli-malpli kreata de la du tiranoj de la Nederlandoj kaj ni aùdas nur deklaron por la nordaj nederlandoj. Majon 1555 Karlo 5-a publikigis

oficialan decidon, poste konfirmitan de Filipo : "En la regionoj de la provincoj Holando kaj Okcident-Friślando personoj, kiuj venas de ekster tiuj du regionoj, rajtas okupi oficon, nur se ili parolas kaj komprenas la lingvon uzatan en la provinco Holando". Tion oni povus konsideri kiel bazon de la posta nederlanda lingvo. Verkistoj, poetoj kaj teatro-verkistoj poste formis kaj evoluigis la lingvon. Sed daŭris longe antaŭ ol oni kutimis uzi la vorton Nederlanda Lingvo. En 1776 la Asocio por Nederlanda Literaturo uzis ĝin unuafoje kaj poste oni emfazis en Belgio tion. En 1932 la universitato de Luveno deklaris, ke la lingvo de la nefranclingvaj belgoj estas la Nederlanda Lingvo. Rilate la unuecon de religio, ankaŭ menciita de Renan, ni povas skribi, ke neniam venis oficiala, deviga ŝtatreligio. Inter la burĝaj regantoj estis katolikoj kaj en la sudaj provincoj la katolika kredo restis aplikata. Oni rajtas konkludi, ke la Nord-nederlandanoj eskapis la absolutismon kaj la kalvinistan inkvizicion, Amsterdamo ne iĝis Ĝenevo, sed komencis simili al Bazelo.

Januaron 1648 la aŭstra imperiestro agnoskis ankaŭ Svision kiel suverenan, sendependan landon, sed tiuj vortoj verŝajne vekas la falsan imagon pri unueca ŝtato kaj unueca popolo, kiu longtempe batalis kontraŭ fremda regado kaj subpremado kaj fine ricevis la kronon sur sia laboro. La estiĝo de la ŝtato Svislando ne okazis tiel simple. Nur 3 kantonoj aŭ regionoj komencis la batalon. Kiel en la Holanda Respubliko la kerno de la ribelo troviĝis en la urboj. La t.n. arbarurboj faris la veran batalon. Jam en 1500 la imperiestro Maksimiliano devis agnoski la suverenecon de 13 kantonoj ; la proklamo en 1648 estis nura formalaĵo. La nuna organizo kaj divido en 22 kantonoj ne estis la rezulto de iu genia, politika penso, sed la rezulto de evoluo en la kadro de naturaj, geografiaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj. Multaj kredas, ke la nomo Svisio estas neŭtrala nomo, ĉar per neŭtrala nomo oni devis kunigi malsamajn kantonojn kun malsamaj lingvoj. Nur en la germana lingvo oni povas retrovi la originon de tiu nomo. La Germanoj nomas la landon Schweiz (ŝvajc) kaj unu el la tri unuaj kantonoj, kiuj unuiĝis en 1291 nomiĝis tiel. Sed kredeble tiu neneŭtrala elekto ne plu vivas en la konscio

de la nunaj svisoj.

Alia erara koncepto pri Svisio estas, ke ĝi tute estas protestanta. En la urboj ĝenerale venkis la Reformacio, sed la arbarregionoj restis katolikaj. Dum la 19a jarcento Svisio estis eĉ religie kaj ankaŭ politike disŝirita, liberaluloj kontraŭ katolikoj. La unuaj venkis. Ili batalis kontraŭ centra regado kaj la rezulto estas la nuna Svisio. La svisa ŝtato estas videbla per svisa, nacia flago, sed sub ĝi ankoraŭ flirtas 22 flagoj de la diversaj kantonoj, apud la naskiĝfesto de la respubliko, la komuna nacia festo, kelkaj kantonoj ankoraŭ festas la naskiĝeston de propra "patrio" kun propra nacia himno. La nacia festo okazas ĉiun jaron la 1an de aŭgusto kaj ĝi servas transkupoli la propran identon de la memstaraj kantonoj kaj fortigi la senton de unueco, de unu nacio. Tiam ili honoras la mistikan, legendan heroon Vilhelmo Tel, pri kiu la historiistoj scias nenion, sed por kompletigi la honoradon oni devas serĉi helpon ĉe germana poeto kaj itala komponisto.

Plu la svisa ŝtato estas videbla per svisa pasporto, svisaj uniformoj. Same kiel ĉe Belgio ni trovas ŝtaton kun naciismo kaj oficiala emblemo, sed ne nacion aŭ unuecan popolon, ne lingvo-unuecon nek religi-unuecon. Tamen la kontrasto kun Belgio estas frapa, la svisa politika fabrikaĵo pace daŭrigas sian vivon, en Belgio ankoraŭ estas amara lingvo-batalo, malgraŭ la por Belgio favora faktoro, unueco de religio.

* *
*

Se la kondiĉoj por la ekzisto de nacia ŝtato kun naciisma ideologio estas : komuna uzado de unu nacia lingvo, certa unueco de kulturo, la ekzisto de kontrolanta kaj administranta ŝtat-aparato, reganta loĝantaron sur limigita teritorio, havanta certajn tradiciojn, tiam ni devas konstati, ke la preskaŭ-insulo Italio restis kiel Germanio longtempe politika mozaiko. El la multaj dialektoj kaj lingvoj, uzataj en la malnova Italio, eĉ la greka lingvo, la dialekto de la regiono Toskano komencis fortrudi la popollatinan lingvon, la malnovan dialekton de Romo en la provinco Latiumo. Tiu procezo okazis

inter 1300 kaj 1600, sed tio kompreneble ne garantiis, ke la sudaj italoj parolis la saman lingvon kiel la Milananoj. Politike Italio restis longtempe disŝirita pri kio grandparte kulpis la imperiismo de Aŭstrio kaj Francio. Sed en 1870 nova, juna ŝtato leviĝis en Eŭropo post la glora marŝo de Garibaldi, kiu devis cedi al necesa centra figuro, la reĝo. Ni do povas konstati, ke la unuigo de politika mozaiko ĉe la itala afero havis tute alian rezulton ol tiu de la svisa afero. Italio atingis unuecon de lingvo kaj de religio.

Skandinava naciismo karakterizas sin per la liberigo de Norvegio kaj Svedio el dana hegemonio. Svedio unua forlasis la union de la tri landoj en 1523 kaj evoluis al imperiisma ŝtato. Norvegio restis en ligo kun Svedio ĝis 1905 kaj la granda teatro-verkisto Ibsen ĝuste povis ĝoji tiun okazon antaŭ sia morto en 1906. Li strebis sian tutan vivon al la memstareco kaj al levo de la nivelo de la norvega popolo. Profesoroj opiniis necese krei norvegan lingvon, ĉar antaŭ tio la Norvegoj parolis ian danan dialekton. Tiel forta estis la deziro de la Norvegoj al naciismo, al propra idento, ke ili opiniis bezonata specialan lingvon tre similan al la aliaj du skandinavaj lingvoj, ĉar la 3 lingvoj apartenas al la danfrisa grupo de la germanaj lingvoj.

Unu el la idealoj de d-ro Zamenhof estis, ke ĉiu lando havu neŭtralan nomon. En la orienta parto de la germanlingva teritorio formiĝis ŝtato, kiu post forlaso de Bavario konservis sian originan nomon Orient-Markio. La t.n. markioj estis formitaj por defendi la german regnon kontraŭ invadoj de fremdaj popoloj. Tradukante Orient-Markio'n ni akiras Aŭstrio'n. Ĝi evoluis tute alie ol la okcidenta parto de la germanlingva teritorio. Ĝi komencis brakumi alikarakterajn popolojn : ĉeĥojn, serbojn, slovakojn, polojn, hungarojn. La lasta popolo estis petata subigi sin al fremda monarĥio, ĉar la habsburgano Ferdinando 1a edziĝis kun Ana de Bohemio kaj Hungario. La aŭstraj imperiestroj estis depost 1867 samtempe reĝoj de Hungario por veki inter la Hungaroj la trompan iluzion, ke ili havas propran reĝon. Krome Aŭstrio akiris pro la dividiteco de Germanio certan hegemonion tie kaj ĝi dis-

vastigis sian influon en Italio. En Bohemio du dialektoj interpuŝiĝis, iu saksa kaj iu aŭstra. Per komparado kaj kribrado oni konstruis iun oficialan lingvon, kiun la Habsburgoj poste transprenis. Antaŭ tiu tempo 1400 la imperiestroj subsignis aktojn kaj dokumentojn en la ĉefurbo Prago en diversaj malsamaj lingvoj, kiujn ili ne komprenis. Per certa lingvo-politiko kaj regado kaj subpremado la aŭstra monarĥio fondis specon de kolektiva ŝtato, iun politikan kaj kulturan kolektivon, kiel Trocki diris : la veran neadon de nacia ŝtato.

Prusio estis la unua germana ŝtato, kiu montris iun memstaran naciismon kaj oni rajtas diri, ke la fondo de la prusa ŝtato en 1600 estis la komenco de la disrompo de la aŭstra kolektivo. En 1866 Bismark venkobatis la aŭstrajn armeojn, en 1870 Italio iĝis sendependa ŝtato kaj en 1918 la nombro de sendependaj ŝtatoj de Eŭropo forte riĉiĝis : Jugoslavio, Pollando, Hungario kaj Ĉeĥo-Slovakio. Kaj ankoraŭ la naciisma splitfungo ne estas sata : el Skotlando, el Kimrio, el la insulo Korsiko ve..is sonoj de naciismo, ankoraŭ la insuleto Man en la irlanda maro ĝis nun silentis, kvankam ĝi havas en certa senco jam proprajn leĝojn kaj propran nacian lingvon. La Kalvinistoj kredis kaj kredas, ke la sorto de la homo estas tute arbitre destinata de dio kaj nenio estas farebla por eviti la destinon. Ŝajnas, ke ankaŭ iu potenco, oni nomu ĝin la historio aŭ Klio, la muzo de la historio, arbitre destinas la sorton de la popoloj. Sed tiel rezonas historiisto armita per idealisma klarigo de la historio. La malfeliĉan sorton de la pola popolo oni povas kompreni, rigardante la mapon de Eŭropo. Pollando kaj la pola popolo estas sufoke premataj inter tri potencoj : Prusio, Aŭstrio kaj Ruslando. Trifoje oni dividis Pollandon, verŝajne pro la fakto, ke tiam ankoraŭ mankis ia forta nacia konscio, sed kiel ajn la pola naciismo restis vivanta sen pola ŝtato, sen pola teritorio, sed certe kun kaŝita flago kaj sekrete kantata nacia himno. La rabantoj en trifoja divido de Pollando kiel jam menciite, estis Aŭstrio, Prusio kaj Ruslando, en kiu agado la reĝo de Prusio hipokrite amikis kun Ruslando kaj Aŭstrio, landoj, kiujn li profunde malamis.

Dufoje la Poloj ribelis kontraŭ Ruslando. Antaŭ la dua ribelo en 1863 okazis io en 1861 la 8an de aprilo en Varsovio, kio pruvis, ke multaj poloj ne nur revis pri la perdita patrio, kantante nostalgiajn baladojn, sed pretis agi kun ofero de la vivo. Antaŭ la palaco de la rusa imperia guberniestro staris amaso da poloj, kiuj kantante esprimis sian deziron : "Redonu al ni la patrion". La amaso promesis ne uzi perforton. La respondo estis murda pafado de la rusaj soldatoj. Multaj falis, sed la amaso daŭrigis la kantadon. Ili interplektis la manojn por kuraĝigi unuj la aliajn. Denove okazis murda pafado, denove multaj falis kaj refoje kaj fine la oficiro ordonis ne plu pafi. La amaso venkis sen la uzo de perforto. Eĉ virino prenis kozaksabron el la manoj de knabo, dirante : "Tiaj ne estas niaj armiloj". Tiu agado de tiuj poloj memorigas nin pri la agado de la unuaj kristanoj. La tuta okazo vekis grandan admiron tra tuta Eŭropo, sed kaŭzis ankaŭ ŝokon de indigno pri rusa kruelo.

Eŭropa milito, malvenko de Ruslando kaj de Aŭstrio kaj de Germanio kreis favoran situacion por la Poloj liberiĝi kaj fondi nacian, sendependan ŝtaton. D-ro Zamenhof neniam spertis tiun okazon kaj tre verŝajne li estus malaprobinta la unuajn agojn de la nova pola ŝtato, kiu pruviĝis same kruela kaj same havema kaj imperiisma kiel la aliaj naciaj ŝtatoj. Eluzante la malforton de la nova Sovet-Unio, ĝi kaptis parton de Ukrajno, teritorion, sur kiu loĝis 16 milionoj da rusoj, kaj kiam poste Stalin rajte reprenis ĝin la tuta mondo ekster Sovetio kriis skandalon pri tio.

***

> "Nacieco, kiel la procezo de la vivo, de digestado kaj spirado, ne rajtas cerbumi pri si mem ĝis tiu rajto estas detenata. Tial la Poloj, la Italoj, la Hungaroj kaj ĉiuj subpremataj slavaj popoloj nature kaj rajte emfazas la principon de nacieco ; kaj tial ni, rusoj, cerbumas tiel malofte pri nia nacieco."
>
> Bakunin.

Kiel la aùstro-hungara ŝtato ankaù la cara Ruslando estis multpopola, multnacia politika kolektivo, en kiu la tribo Grand-Rusoj superregis politike kaj ekonomie. Oni povus nomi la caran Ruslandon iom libere : la moskva imperio. La Grandrusoj verŝajne dankis tiun potencon kaj aùtoritaton al la fakto, ke la caroj de Moskvo liberigis sin de la mongola jugo antaù 1500. Kiel en Aùstrio la sistemo de regado estis aristokrata, bazita sur grundposedo kaj agrikulturo. La industrio kompare kun la okcidento estis nur embria kaj la burĝa elemento pigmea kontraù la milionoj da kamparanoj. La grundposedantoj estis rigardataj kiel la gardohundoj de la ŝtato kaj por krei ian militistan forton la cara registaro amasigis milionojn da gardohundoj. Ĉiu vilaĝo estis devigita liveri rekrutojn kaj samtempe la kamparanojn oni devigis al militekzercado. En grandaj vilaĝoj oni konstruis kazernojn kaj tiel la cara ŝtato havigis al si milionojn da etkostaj batalantoj por la kara patrio, por paĉjo Ruslando. Tiu sistemo ŝparigis milionojn da rubloj. Aliaj gardohundoj estis la oficistoj. Caro Nikolao I-a modeste diris : "Mi ne regas, sed miaj 40 000 skribistoj".

La regantaj Grandrusoj okupis 43% de la loĝantaro. Nacikonscia popolo estis la Ukrajnanoj (Etrusoj) kaj ili vere portu la nomon grandrusoj, ĉar Ukrajno liveris la grenon, per kiu la ŝtato povis pagi siajn ŝuldojn, ĉar Ruslando devis aĉeti industri-produktojn eksterlande. La diversaj militoj en 1905 kaj 1914 komencis veki la naciismon de la popoloj, kiuj ne estis grandrusaj. Poloj, Finlandanoj, Baltoj, Etrusoj komencis post teruraj suferoj demandi : "Por kiu ni batalas, ĉu por la Grandrusoj?"

La vera celo de la marksanoj dum la 1-a mondmilito estis la falo kaj disrompo de la carismo kaj ili klare vidis, ke la naciismo de la diversaj subpremataj popoloj estas utila rimedo kaj armilo. Ili devis oferti la agnoskon, ke tiuj popoloj rajtas havi memstaran nacian vivon, kion la carismo ne povis fari. Lenin diris : "Ĉu nacio povas esti vere libera, kiam ĝi subpremas aliajn naciojn ? Ne, ĝi ne povas. La interesoj de libero por la Grandrusoj postulas batalon kontraù tiu subpremado".

La evoluo kondukis al la formiĝo de Sovetio, konsistanta el 15 socialistaj sovet-respublikoj, kiuj politike ne estas liberaj, sed havas grandan aŭtonomion en kulturo, lingvo kaj religio. Stalin forĝis el la malsamaj popoloj iun artefaritan union, kio malebligis al Hitler engluti unu memstaran respublikon post la alia. La nomo Ruslando oficiale malaperis, la nova ŝtato alprenis neŭtralan nomon, nomon, kiun d-ro Zamenhof estus aprobinta. Sur la trono ne plu sidis grandruso, sed georgiano, Stalin. Moskvo nun regas ankoraŭ 60 grandajn kaj malgrandajn popolojn kaj 100 tribojn. Krom la rusa lingvo 150 aliaj lingvoj estas parolataj. La centra regado strebas al la aplikado de unu lingvo, la rusa kiel ankaŭ la angla registaro kaj nederlanda registaro strebas al la uzado de la oficiala, nacia lingvo.

La opinio de Bakunin, ke t.n. liberaj, ne subpremataj popoloj ĝenerale ne cerbumas pri propra nacieco, estas ĝenerale vera. La nesubpremataj popoloj atingas nacian konscion kaj naciismon en pli trankvila kaj pli malrapida procezo. En Anglio ekzemple tiu kresko al nacia konscio ne pli frue povis komenciĝi ol post 1700. La civitanmilito de Kromvel disrompis la nacion, splitis ĝin kaj vekis amaran malamon. Post ĉio la Angloj komencis fieri kaj konscii pri la konkero de la marpotenco kaj pri la fondo de granda kolonia regno. La ŝovinista kanto "Britio regu la ondojn", ankoraŭ kantata de anglaj junuloj, estiĝis en 1740, kaj la monotona, sintrena melodio "Dio protektu la reĝon aŭ reĝinon" estiĝis en 1745 kaj estas nun la oficiala nacia himno. Malfacile kontrolebla estas kiagrade ĝi estas populara en la tempo de naskiĝo. La kanto "Britio regu la ondojn" certe naskiĝis el la fakto, ke surmare Hispanio, Portugalio, la Holanda Respubliko ne plu estis minacaj potencoj. Alia faktoro fortigis karakterizan trajton de la naciismo ĉe la Angloj, pro la kresko de industrio de post 1720 Anglio akiris la nomon de la plej kapabla kaj plej inventema nacio. Kun granda fiero nobeloj kaj burĝoj aranĝis la unuan mondekspozicion en 1851. Por la naciistoj tiam Anglio atingis la supron de la mondo. Sed realfalsiste oni takte silentis pri la maniero, en kiu oni atingis tiujn industri-produktojn kaj estis ĝuste la verkinto de la unua libro pri kapitalista ekonomio Adam Smith, kiu akre protestis pri ekstrema ekspluatado, precipe pri

infanlaboro. Li montris ankaŭ, ke la termino "nacio" estis pli kaj pli uzata. Li nomis sian libron : "Esploro en la Naturo kaj la Kaŭzoj de la Riĉo de la Nacioj". En 1758 iu sviso verkis libron : "La Nacia Fiero". Ĉirkaŭ 1750 iu germana verkisto kreis la kombinon "Nacispirito".

Ni jam menciis, ke la nacia himno en komuna kantado plej ekzalte kredigas la homojn pri la valoro de naciismo kaj levas la anojn super ilin mem kaj tiel ni skribis jam pri la neeblo trovi iun fadenon de Ariadna, tio validas ankaŭ, se ni serĉas tra Eŭropo al naciaj himnoj. Ekzemple, konsiderante, ke precipe Svisio bezonas komunan nacian himnon por fortigi la senton de unueco de 22 kantonoj kaj de 3 malsamaj lingvoj, oni povas demandi, kie la nacia himno de Svisio estas kaj en kiu lingvo ĝi ekzistas. Belgio havas nacian himnon, akceptitan de ĉiuj belgoj, sed ĝi estas verkita en la franca lingvo, lingvo de malplimulto. La belga registaro uzis la francan lingvon ĝis 1900. Pli-malpli nacia kanto ekzistas ankaŭ por nederlandlingvaj belgoj : "La Flandra Leono", sed ĉe oficialaj okazoj oni kantigas la unuan. La oficiala himno de Nederlando oficialiĝis ne pli frue ol 1932, poemo kaj komponisto vere ne estas konataj. Ĝi konsistas el teksto dediĉita al Vilhelmo la Silentema, germano, kiu gvidis la komencon de la 80-jara milito. Vera bezono pri nacia himno do naskiĝis tre malfrue en la libera Nederlando.

La nacia himno de Aŭstrio estas dediĉita al Francisko la Imperiestro kun melodio de Jozefo Hajdn, kiu ironie laŭ kelkaj muzikologoj venis el Ĉeĥio. Kiam Germanio poste liberiĝis de la kuratoreco de Aŭstrio, ĝi transprenis la melodion, sed aldonis pure naciistan tekston kun minaca enhavo : "Germanio super ĉio". La nacia himno de la cara Ruslando petas de Dio protekti la caron, same kiel la angla nacia himno petas la samon por la reĝo aŭ la reĝino. La tri skandinavaj landoj certe havas ĉiu propran nacian himnon, ĉar la sveda mencias ion pri "la alta nordo", kiun danoj ne povus transpreni. Grandan enigmon donas al ni la itala popolo. Tiu muziktalenta popolo kun muzika lingvo ne transprenis la melodion de la Garibaldianoj, kantatan dum la nacia liberiĝo en 1861.

Poste oni kutime konsideris napolan kanton la nacia himno, poste Maskanji komponis faŝistan kanton : "Juneco", kiu post la milito ne plu estas uzinda kaj momente oni kantas ĉe oficialaj okazoj iun specon de opermarŝo. Jen popolo kun muziko praktike sen konata nacia himno. La franca nacia himno ne nur estas nacia aŭ naciista, sed ĝi estas ankaŭ inspiro al batalo kontraŭ tiraneco, ankaŭ kontraŭ franca tiraneco. Ĝi estis kantata dum la revolucio kaj dum la batalo kontraŭ aliaj landoj, sed ĝi estis kantata ankaŭ en la revolucioj en 1830, 1848, en 1871 dum la Komuno de Parizo, kontraŭ la tiraneco de s-ro Thiers, kiu ankaŭ estis devigita kanti la saman Marseljezon.

Memorante la opinion de Bakunin pri dezirata sed detenata nacieco, ni scias, ke io detenata vekas pli fortajn imagojn kaj pli fortan volon por atingi la celon. Ĝi vekas en la koncernaj homoj ian mistikan, religian sinoferemon, kiu pelas la homojn blinde al la batalo. En sia libro "Interpopola Konduto" Privat priskribas homojn, kiuj pro politika aneksado kaj subpremado ne rajtas elvivigi sian naciecon. "En aneksita lando la patrujo estas spirito. Por kompreni tion, necesas vidi popolon suferantan. Gardas polico. Kurtenojn oni fermas. Kvazaŭ sanktaĵon oni kisas flagon malpermesatan. Lingvo fariĝas simbolo". Tiuj linioj vekas imagojn pri poloj sub aŭstra, rusa kaj prusa subpremado kaj loĝantoj de Alzaco post 1871. Sed ankaŭ italoj en la nordo de la lando estis daŭre ĝenataj de francaj uniformoj kaj franca lingvo kaj de aŭstraj uniformoj kaj germana lingvo. La muzo de la historio ironie okazigis, ke la naskiĝdokumento de la posta nacia operkomponisto Verdi en 1813 estis la lasta dokumento skribita en la franca lingvo en la urbeto Buseto kaj kiam li kiel juna komponisto volis hejmigi sin en 1837 en Milano, li ĉe la pordego devis montri pasporton skribitan en la germana lingvo al serĝento en aŭstra uniformo, armita, kaj sur la pordego troviĝis ne en la itala lingvo, sed en la germana : "Urbogardo". Kiel Privat skribis : Lingvo iĝas simbolo. Tiukaze la germana lingvo efikis kiel vipo al naciisma malamo kaj al konsciiĝo pri propra

idento kaj nacieco. Pli fortan efikon havis la armitaj soldatoj en fremdaj uniformoj. En landoj kiaj Pollando kaj Italio la naciismo estis ideologio en batalo por libero, por la fondo de libera, sendependa, nacia ŝtato, en kiu idealo ĉiuj sociaj klasoj partoprenas, nobeloj, burĝoj, laboristoj. En tiu situacio la naciismo estas ne nur psika fenomeno, sed ankaŭ socia fenomeno.

Ankaŭ revoluciaj marksanoj kun internacia konscio pretas aprobi tian naciismon kaj tian batalon por sendependa ŝtato kiel necesan stadion en la evoluo politika kaj socia de la homo sur la vojo al la internacia socialismo. Sed la laboristoj daŭrigu la nacian revolucion kontraŭ siaj iamaj samliganoj, la burĝoj, kiuj tuj volas ĉesigi la revolucion post la atingo de la ekonomia kaj politika potenco. La nova patrio por la laboristoj tiam estu la mondo. Ni ĉiuj scias, ke la fondo kaj unuigo de la nacia ŝtato efikis tute alie al la klaskonscio de etburĝoj, kiuj ankaŭ estis ekonomie subpremataj kaj ekspluatataj de la grandkapitalo, kiu mem tute ne havas patrion kaj efikis katastrofe al la laboristaj partioj en ĉiuj landoj. Aŭguston 1914 amasoj da junuloj hurais histerie, inter ili ankaŭ la germana marksana historiisto Maks Veber, kaj ekmarŝis al imagita bela estonto, promenado al malamika fremda lando por sperti 4-jaran vivon sub pedikoj kaj koto. La mistika imago "patrio" forpelis aliajn eblajn motivojn, ekzemple, ekonomiajn motivojn aŭ aliajn idealismajn motivojn kiel la internacian socialismon. La amasoj, kiuj ne havis ekonomiajn interesojn en la defendata lando, ekmarŝis por malracie defendi propran mizeron. Aŭguston 1914 multaj, mizeraj kamparanoj genufalis antaŭ la Vintro-Palaco de la caro en Petrograd kaj murmurante ĵuris tie oferi sian vivon por paĉjo la caro aŭ por paĉjo Ruslando, tute ne konsciante, ke la kara patrio havis la nomon de nur unu popolo, la Grandrusoj. Privat skribis : "La amo al sia patrio levas la homon super lin mem, jen ĝia belaĵo. Sed ne super lian monon, jen ĝia manko. Flegante la nacian korpon la patriamantoj malzorgas la krurojn kaj brakojn. Ili atentas tro ĉefe la lipojn." Kaj,ni aldonas,malgraŭ tiu malzorgado milionoj kondamnitaj al sklava laboro de nur kelkaj ekonomiaj potenculoj, amasoj vivantaj sur minimumo de ekzisto

militiris kaj tute ne havis kialon por ami la karan patrion. Tamen Privat skribis en sia jam menciita libro "Interpopola Konduto" : "La konscio pri klaso estas foje tiom forta kiom la konscio pri nacio". Jes, tio foje okazas. Estis en 1914 tre malmultaj, kiuj kuraĝis aserti, ke ili ne havas patrion, ilin ne trompis la gazetoj de la riĉuloj, kiuj per instigaj artikoloj kaj sloganoj forlogis la amasojn al militiro, dum tiuj riĉuloj mem tute ne havas patrion : ilia kapitalo estas internacie investita.

Ekzemple, la angla poeto Vilfred Oven, kiu mem spertis la mizeron de la 1a mondmilito, akuzas la naciistajn idealistojn pri kruda egoismo, ilia idealo postulas multajn senkulpajn oferitajn junulojn. Dum generaloj surbruste paradas per brilaj medaloj kaj ordenoj, la veraj blindaj herooj dronas nekonate en koto kaj ŝlimo. Li skribis : "Ne mortsonorilo por kiuj mortis kiel brutaro. Nur la kolero de la kanonoj, la krakantaj fusiloj elkrakas ilian rapidan preĝon."

D-ro Zamenhof neniam tuŝis la problemon de nacio dividita en klasoj, li neniam skribis ion pri la batalo inter kapitalo kaj laboro, sed en 1913 li tre singarde esprimis sin pri "nenormalaj eksteraj cirkonstancoj, kiuj povas paralizi la naturan senton de patriamo."

Lia adepto Privat klare vidis la naciojn splititajn en klasoj. Li akre atakas la trompajn sloganojn, kiujn patriotoj kaj patri-amantoj uzas por konvinki la neposedantojn de iu nacio. Li citas la vortojn de militrifuzanto antaŭ la tribunalo, kiu indigne diris : "Mi ne konas tiun ĉi patrujon. Estas nia tero amata, vi diras, sed el ĉi tiu grundo mi ne posedas eĉ unu kvadratan centimetron kaj al mi ĝi estas tiom fremda kiom tero ĉina aŭ perua. Vi diras "nia tero", kiam ni defendu ĝin, sed vi ne plu diras "nia" kiam ni dividu ties fruktojn. Kial mi ĝin defendu ?". Kiam la juĝisto uzis la vorton malamiko, iu rifuzanto kolere reagis : "La malamikojn de mia edzino kaj de la filinoj de la popolo vi ne serĉu trans la landlimoj. Ili staras ja pli proksime sur la kamparo, en fabriko, en oficejoj kaj magazenoj." Alivorte : la malamiko, la klasmalamiko staras en propra lando, slogano ofte ripete elkriata, sed kiu ne trovis lokon en la konscio de la labor-

antaj amasoj.

Kiam s-ro Antonio Philips revenis post la 2-a mondmilito el Ameriko en Nederlandon, amasoj da laboristoj bonvenigis lin kun ĝojo kaj kun festa serenado. Sed laŭ Privat tamen en 1917 kaj 1918 multaj rusoj kaj germanoj trovis la malamikon en propra lando kaj per revolucio provis fini la militon : tiam multaj bedaŭris, ke ili ne faris revolucion antaŭe por eviti la tutan buĉadon. Al la Rusoj ni dankas la ekzemplon, ke, se popolo volas fini militon, ĝi ankaŭ povas. Se la potenco glitis el la manoj de Kerenski, li mem kulpas, ĉar en 1917 li klare diris, ke li pretas defendi la kulturtrezorojn de Ruslando, sed forgesis mencii al kiuj tiuj trezoroj apartenis.

***

La revo de Karlo la Granda organizi unu Eŭropon, unuigi la francan kaj la germanan partojn diskrevis, ne kiel idealismaj historiistoj diras, pro malkapablo de liaj sekvantoj, sed pro la manko de efikaj kaj rapidaj komunikiloj. La nura trafikilo estis, tiutempe, la plej rapida pensebla, kuriero surĉevale, kiu devis liveri mesaĝon tra distanco de miloj da kilometroj. Efika regado kaj kontrolo ne eblis. Eŭropo dissolviĝis en milojn da etaj ekonomiaj unuoj, provizantaj sin mem kaj super tio ŝvebis iu internacia konscio, korpigita en la Rom-Katolika Eklezio. Karlo vidis, ke regi kaj krei certan unuecon ne eblos sen la Eklezio, kiu tiam posedis ĉian spiritan potencon, ĉian kulturon kaj sciencon kaj estis la nutristino de arto. Dum la jarcentoj novaj principoj komencis trarodi tiun internacian konscion, la naciismo kaj la individuismo, ambaŭ reprezentataj de Johana d'Ark. Ŝi agis ne nur por la libero de Francio sed ankaŭ por la libero de la individuo. Por la eklezia tribunalo ŝia plej granda peko estis, ke ŝi parolis rekte al dio sen la helpo de pastro. Johana per tio atakis la arogon de la pastroj kaj komencis submini la aŭtoritaton de la eklezio. La etaj ekonomiaj civitoj kreskis al ŝtatoj, kiuj pli kaj pli ektransprenis taskojn de la eklezio. Tiam venis la granda batalo inter

eklezio kaj ŝtato pri politika kaj spirita regado de la homoj, batalo ankoraŭ ne finita. La plenkreskintaj, grandaj ŝtatoj, liveris fine novan, pli fortan religion apud la malnova, la naciismon. Kaj ĝi posedis pli fortan rimedon por obeigi la homojn al militkrimoj ol la eklezio, kiu ne rajtas uzi armilojn, sed nur rajtas beni ilin por la imperiistaj interesoj de la nacia ŝtato. Fine reĝoj kaj imperiestroj liberigis sin el la politika potenco de la Rom-Katolika Eklezio kaj la nacia, sendependa ŝtato tute disrompis ankaŭ la internacian potencon de la eklezio, de la papo. La ŝtatanoj ĉu germanaj, francaj, polaj aŭ aliaj, unue sentas sin ŝtatanoj, nacianoj antaŭ ol esti katolikoj aŭ protestantoj, kaj pretas mortigi samkredanojn trans la limoj, fratojn en la sama kredo. Oni rajtus deziri, ke la papo havu la saman potencon de la Mezepoko por malebligi al germanaj katolikoj mortigi francajn aŭ rusajn katolikojn. Sed dum la 2-a mondmilito la malo okazis. La Sankta Seĝo aprobis la agadon de Hitler, ĉar li tiom efike agis kontraŭ la demona komunismo, t.e. ekstermis multe da rusaj katolikoj kaj la papo tute silentis kaj silente aprobis la amasmurdon de la judoj, forgesante, ke ankaŭ Jesuo estis judo. Same li devis silenti pri la naŭza traktado kaj murdado de la pola popolo kaj ili estis agnoskantoj de la religia aŭtoritato de Romo. Tiel demona, detrua naciismo rompis la internaciecon de la Rom-Katolika Eklezio, la nura restaĵo de la revo de Karlo la Granda pri unu Eŭropo. Sed antaŭ la milito SAT-anoj povus konvene saluti kaj aprobi la Rom-Katolikan Eklezion pro unu trajto, kiel kunbatalanton kontraŭ la moderna naciismo. En Francio la naciista junulmovado, la Rojalistoj, forlogis multajn junulojn el la katolika junulmovado. En 1913 papo Pio XI deklaris okaze de sia surtroniĝo en la Encikliko Urbi Arcano : "Ĉiuj popoloj, kiel partoj de la homa familio tutmonda, devas esti kunligitaj per frateca kutimo. La amo al la patrio kaj al la raso iĝas fonto de multaj maljustaĵoj kaj malnoblaĵoj. Transirante la limojn de la justo, ĝi defalas al troa amo al la nacio." Estas kvazaŭ ni aŭdus d-ron Zamenhof. Li certe estus kondamninta edukadon al naciismo, kiel ni SAT-anoj. Sed la motivoj de la papo estas tute malsamaj. Ambaŭ, naciismo kaj katolikismo, ŝnuras kaj

korsetas la homan spiriton, ĉe ambaù oni devas lerni sian lecionon kaj apliki dogmojn, sed se la papo diras ne havi patrion kaj agnoskas nur la homaron, li postulas de siaj kredantoj nei la rezultojn de la moderna scienco, li komandas ilin apliki malnovan evangelion en moderna kapitalista socio, kiu ne predikas amon, sed emfazas la egoistajn instinktojn de la homoj, li ordonas konduti laù severa, strikta moralo, li volas membrigi ilin al internacia, sed tre reakcia kaj malḋemokrata organizo, en kiu la individuo ne hahas ian rajton en la regado, dum la naciismo almenaù agnoskas siajn anojn kiel plenrajtajn civitanojn. Tamen la moderna ŝtato povas esti pli maljusta kaj hipokrita ol la Katolika Eklezio. La franca ŝtato neniam publike konfesis sian eraron en la Drejfus-afero, ke li estis senkulpa, sed 25 jarojn post la mortigo de Johana d'Ark la eklezio publike konfesis sian eraron, mortiginte tute senkulpan knabinon. Tragika fakto : 500 jarojn post la naciismo de Johana oni mortpafis la socialiston Jaurès, internaciiston, viktimon de la franca naciismo.

***

Ni jam menciis, ke la lukto por internacia aù sennacia konscio havas la malavantaĝon de la lingva problemo, dum la lukto por la nacia konscio ofte estas helpata de oficiala komuna lingvo, la nacia lingvo. Sed la naciismo renkontis sur sia vojo obstaklojn de alia naturo, precipe kiam ĝi devis konkeri pli vastajn teritoriojn aù pli vastajn komunojn. Ĝi kreskis samtempe kun la maturiĝo de la homoj. Kiel la naciismo povis kunŝnuri multajn, memstarajn mempensajn individuojn al unu komuno kun la sama kredo en unu ŝtato ?

Ni jam aùdis de Stalin : nacio estas komuno de homoj, en kiu ajn formo, grupo, hordo, tribo, klano en kiuj la individuo ne povis ekzisti, ĉar la batalo kontraù la naturfortoj postulis absolute solidaran, unuecan grupon, la individuo devis por la komuna bono cedi siajn individuajn dezirojn kaj subigi sin al la komunaj interesoj. Oni argumentas, ke tio en primitiva

tribo facile eblas, ĉar individuaj sentoj kaj pensoj tiam nur nebule vivis, sed ni devas memori la Kalvinistojn, kiuj tute demokrate individue subigis sin al iu komuna diktaturo por formi ian nerompeblan bandon por la batalo kontraŭ Romo, ĉiu akceptis libervole tiun diktaturon, ĉar ĉiu sentis sin parto de ĝi, ili formis kvazaŭ ŝtaton en la ŝtato, kiel en kelkaj demokrataj landoj katolikoj formas maldemokratan ŝtaton en la ŝtato. Sed por la naciismo venis el la individuismo nova obstaklo, nome la formado de familio. La naciismo devis kunigi multajn memstarajn familiojn kun specialaj familiaj interesoj. La subkonscia menso de la homo kontribuis ion al tio, la familio estas bazita sur la patro aŭ la prapatro, la fondinto de la tribo, kies regno poste per mistikaj imagoj estis vastigita al la universo. Ĉi tie religio kaj naciismo intertuŝiĝas. De famili-patro, de triba patro estas nur unu imagita paŝo al la patro de la lando, al la patrio. Ĉiuj patrianoj subkonscie sentas sin kunŝnuritaj per mistika kredo de komuna deveno. Oni eble ne volas kredi, ke tiuj primitivaj kompleksoj en la moderna homo tute mortiĝis, sed kaze de milito la moderna homo ĵetas sin en la batalon, regate de la samaj primitivaj instinktoj kaj de la sama subkonscia, mistika kredo de la prahistoria tribo. Li tre facile demetas la malpezan jakon de la civilizo. Ekzemplon de returniĝo al primitiva mistiko donas la novfaŝista grupo en Okcidenta Germanio, kiu nomas sin Filoj de Votan, la mita, pagana dio de la Germanoj antaŭ la kristanismo. En la kunvenoj regas la sama mistika atmosfero de pragermana aŭ kelta tribo, oni aplikas la samajn mistikajn ritojn kaj havas la samajn simbolojn. Eble en aliaj popoloj faŝistaj grupoj faras la samon. Ni ne povas image vidi, ke la Nacia Fronto de Anglio kunvenas same kiel la mitaj druidoj faris. Same la hitlernaciismo uzis mistikan simbolon, la svastikon.

La naciismo do superas la konscion de la individuo kaj la sentojn de familia unueco, oni konceptas la nacion kiel pli vastan familion, kiel ni jam aŭdis en la unuaj linioj de la franca nacia himno. Poste ni citos la pensojn de D-ro Zamenhof pri tio.

Alia obstaklo por la evoluo de la naciismo estis la divido de la socio, de la patrio, en malsamaj sociaj klasoj

kaj la klasbatalo. Montriĝas, ke en milito ankaŭ la malriĉaj klasoj, ĉu etburĝaj, ĉu laboristaj, perdas la klaso-solidarecon al la nacia solidareco, ke ĉiu klaso, ĉu reganta, ĉu subpremata, cedas al la samaj subkonsciaj kompleksoj kaj traŭmatoj. Eĉ Bebel kaj Maks Veber pruvis, ke malgraŭ marksana scio kaj edukado, ankaŭ ili estis infektitaj de la naciisma viruso kaj ke sociaj regantoj, sed ne militgvidantoj, tute sennecese cerbumis pri la problemo de la partopreno de la malriĉuloj en la milito. Eĉ membroj de la bolŝevika partio de Lenin entuziasme anoncis sin en Anglio kaj Francio por soldatiĝo por batali kontraŭ la krudaj Aŭstrio kaj Germanio, kiuj atakis la karan Ruslandon regatan de la paĉja caro. Ankaŭ katolikaj membroj de la nacio partoprenis malgraŭ la internacia evangelio kaj rilate benon de la armiloj la Rom-Katolika Eklezio kaj la aliaj protestantaj eklezioj estis en granda morala embaraso. La eklezioj estis venkbatitaj de alia pli forta religio kaj de pli intima religio, kiu ne uzis fremdan lingvon, sed la karan nacian lingvon. Ankaŭ ne la aŭstraj regantoj bezonis malcerti pri la partopreno de la subpremataj popoloj, la ĉeĥoj, hungaroj kaj aliaj. Se la naciaj sloganoj eble ne efikus, aliaj idealismaj sloganoj helpos : libero, demokratio, reformoj, sed ĉiuj post la milito.

Sed tamen ĵus antaŭ la 2-a mondmilito montriĝis, kiu klaso estas la vera morala kaj spirita spino de la naciismo. La plej fanatikaj subtenantoj de la hitlernaciismo estis la etburĝaj klasoj : butikistoj, kiuj bankrotis en la krizo, ĉiuj klasoj etburĝaj, kiuj sentis sin superaj al la laboristoj : oficistoj, kontoristoj, instruistoj, etkomercistoj kaj etentreprenistoj. Krome aldoniĝis multaj sociaj kripluloj, ĉu pro propra kulpo aŭ ne, kaj defalintaj nobeloj kaj maldungitaj oficiroj.

Ni ĵus menciis, ke malgraŭ la komuna nacia lingvo, la naciismo tamen renkontis obstaklojn sur sia vojo. Oni povus atendi, ke dum kaj post la militoj de Napoleono la propagandistoj por la naciismo en Germanio estos aplaŭde akceptataj. Kontraŭe. La nura ŝtato kun forta naciismo estis Prusio, kompreneble kun prusa naciismo. Sed en Rejnlando, kiu estis regata laŭ la idealoj de la

franca revolucio, oni pli ŝatas havi francajn regantojn ol germanajn, almenaŭ la senrajtaj, malriĉaj amasoj. Eĉ la batalanto por forta, libera Germanio, Ludoviko Jahn (jan), kiu daŭre elsputis sian galon kontraŭ ĉio, kio estis franca, kiu eĉ diris en prelego, ke knabino, kiu lernas france iĝos prostituino, kiu fondis gimnastikklubojn por krei fortan, militpretan nacion, iĝis dum la reakcio post Napoleono la viktimo de konservativaj, kontraŭliberalaj fortoj. Oni riproĉis, ke li disvastigis "la danĝeran doktrinon de la germana unueco". En 1820 oni malpermesis la gimnastikklubojn kaj Jahn malaperis en la fortikaĵo Spandaŭ, kie ankoraŭ estas la naciisto Hes. La paroladoj de la filozofo Fichte (fiĥte) ne plu povis esti presataj en Berlino. Tamen komenco de unueco okazis post Napoleono. Oni formis la Germanan Ligon el 13 germanaj ŝtatoj, kies prezidanto estis la imperiestro de Aŭstrio.

Ni jam atentigis pri la naciismo kiel progresiga faktoro, kiu pligrandigas la unuecon en la mondo kaj en la dividita Germanio la plej noblaj spiritoj, pensuloj, homoj de kulturo, propagandis tiun unuecon. En la granda kontinento Ameriko ni povas vidi la naciismon kiel unuigan forton kaj samtempe kiel splitfungon. En Usono oni artfare, devige enpumpas la naciismon, sed Usono devas fari tion, sen naciismo la 50 ŝtatoj kreus politikan ĥaoson, sen naciismo ne ekzistus iu Usono kaj tio povus esti nur katastrofo por la mondo. La atako de la Japanoj al Havai skuis nacion kaj ne nur kelkajn ŝtatojn kaj tio devigis Usonon ankaŭ partopreni en la batalo por la detruo de la monstro Hitler. Oni enpumpas la naciismon en la lernejoj jam per saluto al la nacia flago, per kantigo de la nacia himno kaj en gazetoj kaj en kunvenoj oni ofte povas aŭdi, ke Usono estas lando de dio mem. Usono urĝe bezonas naciismon, ĉar ĝi estas la granda kaldrono de la mondo, en kiu multaj malsamaj rasoj kaj popoloj loĝantaj en tute malsamaj klimatoj kaj malsamaj sociaj kondiĉoj estas kune kuirataj kaj fritataj al unu unueca miksmanĝo kaj se ni, esperantistoj, strebas al pli da unueco en la mondo, ni bonvene salutu la usonan naciismon, malgraŭ nia internaciismo aŭ sennaciismo. La 50 ŝtatoj estas kunforĝitaj per unu ideologio malgraŭ malsamaj kulturoj,

malgraŭ multaj malsamaj lingvoj. Por tio oni ankaŭ devas enpumpi lingvon, interŝtatan lingvon, devigan fakon en ĉiuj lernejoj, la lingvon de la anglaj puritanoj, kiuj fondis la unuajn ŝtatojn en la oriento de la kontinento. La naciismo povas esti instigo per unueco de lingvo al pli alta kulturo, kvankam la ekzemplo de Germanio ne pravigas tion. Sed ĝenerale la naciismo montras sian negativan flankon, ĉiu ŝtato ŝargita de naciismo volas vastigi sian influon kaj pligrandigi sian potencon kaj pro tio subpremas kaj malebligas la naciismon de aliaj. La naciismo ŝanĝiĝis kaj transformiĝas al imperiismo. La juna nova ŝtato, fondita en 1776, estinta kolonio mem volas detrui la koloniismon de aliaj ŝtatoj kaj tiel per milito kontraŭ Hispanio liberigis ĝiajn koloniojn, sed la liberigo estis nur idealista mantelo por kaŝi propran imperiismon. La novaj liberaj landoj iĝis kolonioj de la usona kapitalo. Sur la kontinento mem ĝi aneksis Teksason kaj konkeris per milito kontraŭ Meksikio Nov-Meksikion kaj Kalifornion.

Usono, kiu kreis unuecon, malpermesas kaj malebligas tiun saman unuecon al siaj sudaj najbaroj. Mez-Ameriko konsistas el 6 malgrandaj landoj, ĉiuj memstaraj, kun limoj kaj kun propra mizero kaj malriĉo. Lingvaj malfaciloj ne ekzistas, tre oportune ili povus krei unuecon per fondo de federacio, sed la potenca najbaro supre daŭre torpedas tiun strebadon. Kun nacia memstareco ili unu post la alia povas pli facile esti kaptaĵo por la usona kapitalimperiismo. Ĉu la reĝimo, kiu estas la servisto de tiu kapitalo, estas barbara, faŝista, maldemokrata, tute ne gravas, kaj se unu sukcesas liberigi sin de la subpremado, ĝi provizore festos longtempe sian sendependecon kaj ĝia naciismo estos pli forta ol antaŭe, ĉar ĉi tie la naciismo estas revolucia ideologio fortigita de la idealo libero, nacia libero. La naciismo en ĉi kazo ne estas nur nacia ideologio, sed samtempe soci-revolucia batalkanto kontraŭ subpremado kaj ekspluatado, instigilo al klasbatalo kontraŭ reganta kliko de propra nacio, simila al la naciismo de la franca revolucio. Provizore ni ne vidos la Unuigitajn Ŝtatojn de Mez-Ameriko, provizore tiuj landoj estos okupitaj venkobati la malamikon en propra lando.

***

Negativaj flankoj de la naciismo montras sin en vanteco kaj supertakso de propra nacio, kio kondukas al aroga naciismo. El la plumo de germana ĵurnalisto Blej fluis jeno : "Ni estas la plej kapabla popolo, la plej funda sur ĉiuj terenoj de scienco kaj arto. Ni estas la plej bonaj koloni-organizantoj, ni havas la plej kapablajn maristojn, eĉ la plej bonajn komercistojn. Tamen oni detenas de ni nian parton de la riĉoj de la mondo." Kiam s-ro Blej skribis tion en gazeto, li simple venenis la germanan popolon, li kreis arogon kaj instigis al havemo kaj rabemo. La germanaj gvidantoj longtempe ĵaluzis Anglion kaj Francion. Ankaŭ la aroganta germana imperiestro Vilhelmo 2-a estis firme konvinkita pri superec de propra nacio : "Sur la oceano kaj trans la oceano grandaj decidoj ne povas okazi sen Germanio kaj sen la germana imperiestro". Kaj vere prezidento Rosevelt konstatis, ke germanaj bankoj havis la financan kontrolon en multaj landoj kaj li kiel kapitalimperiisto volis transpreni tiun kontrolon, kiel li ankaŭ volis transpreni la imperion de la Angloj.

Pro la falsa dogmo de la supereco de propra nacio, la naciismo sentas sin devigata falsi la historion por firme kredigi la nacianojn je tiu supereco. Tiel, ekzemple, la nederlandaj histori-libroj, kvankam grandparte objektivaj kaj toleremaj, sugestas, ke la Holandanoj solaj atingis la venkon post la 80-jara milito kontraŭ Hispanio. Oni prisilentas la monon de la angla reĝino, la helpon de Germanio, kvankam tie regis habsburgano, la fakton, ke la armeo de la respubliko konsistis duone el eksterlandaj, dungitaj soldatoj, multaj francoj kaj ironie el germanoj, kiuj devis verŝi sian sangon por la libero de holandanoj. Oni silentas ankaŭ pri la kruelo de la Kalvinistoj, pri la senkulpaj viktimoj de la katolika eklezio.

Iu nederlanda verkisto skribis, kiam oni en Nederlando timis ĉ. 1850 esti englutata de Anglio aŭ de Prusio, en letero : "Post esti aneksitaj de Lia Reĝa Moŝto de Anglio, ni ne plu bezonas vidi naciajn heroojn. Mi vidas bone, kiel malbone la Historio de la Patrio estas verkita. Estos

pli bone, kiam ni ne plu havos patrion kaj estos liberaj de la senespera neceso fabriki heroojn, uzindajn por la junularo. Kiajn malverojn oni kredigas al la infanoj, oni ne inventas faktojn, sed oni kaŝas faktojn". Tiu verkisto estis Multatuli kaj ni rajtas saluti lin kiel unu el la plej unuaj sennaciistoj de Eŭropo.

En filmoj okazas la plej impertinenta falsado favore al tiu aŭ tiu nacio. "La Ponto super rivero Kvai" donas tutan misgvidan bildon. En la filmo la Angloj ludas la decidan kaj pli kuraĝan parton, sed reale ili praktike faris nenion aŭ malmulton kaj la ĉefparton faris aŭstralaj kaj nederlandaj militkaptitoj. Feliĉe por la Angloj tie ne estis usonaj militkaptitoj. Same okazis en la filmo "Koldits", farita kiel pilolo por vigligi la anglan naciismon, iom palan post la perdo de la imperio. Oni aŭdas kaj vidas preskaŭ nur anglajn kaptitojn kaj prisilentas la fakton, ke angla eskapinto ĉiam bezonis havi nederlandan akompananton por la lingvaj malfacilaĵoj.

En tempo de milito okazas subtakso kaj morala kondamno de la kontraŭulo. La anglaj profesiaj generaloj dum la Burmilitoj en Sud-Afriko moke ridis pri la burgeneraloj, ĉar ili estis kamparanoj kaj pruviĝis, ke tiuj buroj estis ruzaj kaj sagacaj armegvidantoj kaj eĉ superis la anglajn profesiulojn.

Dum la milito en Vjetnamio la fieraj, arogaj francaj oficiroj tute misjuĝis la popolon de Vjetnamio kaj ilian generalon. Ili amare spertis sian malpravon. La usonaj soldatoj eĉ insultis tiun kuraĝan kaj inteligentan popolon kaj nomis ĝin "splitokuloj". Ankaŭ ili baldaŭ vekiĝis el revo kaj montriĝis, ke tiuj splitokukoj estis pli civilizitaj rilate la trakton de militkaptitoj. La usonanoj ankaŭ grave eraris rilate la mistikan forton de ideo. Ideo estas pli forta ol tanko, ĉar ĝi ne estas kaptebla aŭ detruebla kaj la ideo en Vjetnamio ne estis komunismo, sed naciismo. Eĉ per por ni neimageblaj detruiloj la usonanoj ne povis ekstermi tiun misteran spiritan potencon.

Fine la milito iĝis afero de prestiĝo por Usono. Oni serĉis honorplenan pacon, tio liberigis ĝin de la konfeso, ke ĝi militmalvenkis. La patrio ne volus permesi

tion, tio vundus la nacian fieron.

Dummilite aperas ankaŭ la etmoralo kaj la maltoleremo de la naciismo. Usona komunisto, kiu akiris altan distingon en la 2-a mondmilito, ne akiris la laŭleĝan rajton esti enterigata en la honora tombejo en Arlington. Tribunalo en Ĝeorĝio rifuzis sidejon en ŝtataj kunvenoj al iu, kiu dufoje estis leĝe elektita, ĉar li ne samopiniis kiel la aliaj elektitoj pri la milito en Vjetnamio. Leŭtenanto estis kondamnita al du jaroj de peza laboro, ĉar li partoprenis civilvestite en manifestacio kontraŭ la milito. Instruisto, kiu rifuzis saluti la nacian flagon pro la milito estis eksigita el la ligo de instruistoj, daŭre li estis minacata kaj ĝenata per telefonado, oni minacis eloficigi lin. Li eltenis 38 tagojn, tiam li cedis.

Juĝisto en Filadelfio proponis eligon de studentoj, kiuj partoprenis en manifestacioj. Profesoroj, kiujn oni suspektis pri simpatio kun Vjetnamio, estis prispionataj dum vojaĝoj. Nun la naciismo falis al tiraneco super propraj nacianoj kaj tio okazis en nacio, kiu ĉe la naskiĝo levis la standardon de la Homaj Rajtoj. Sed kapitalistoj kaj komercistoj havas pli larĝan kaj pli vastan internacian rigardon, ili ne posedas naciisman etmoralon. Kelkajn kilometrojn de la Pentagono situas armilfirmo Interarmko, kiu pretas liveri ĉinajn, rusajn kaj ĉeĥajn armilojn al kiu ajn, ankaŭ al Ho Ĉi Min kaj patriamaj, junaj usonaj soldatoj estis mortigataj de armiloj, kiuj venis el propra, kara patrio. La burĝa klaso havis siajn perfidulojn, kiuj liberigis sin el la burĝa, etvida konscio kaj turnis sin al la batalo de la proletaro, sed ankaŭ la egoista naciismo feliĉe havas siajn perfidulojn. Kiam Hitler vidis en 1942, ke li ne povos venki per tankoj kaj aeroplanoj, li starigis komisionon de sciencistoj, kiu devis trovi pli potencajn detruilojn. Sed ekde la komenco de la instalo tiuj interpromesis silente saboti kaj ne realigi la atombombon, kun la escepto de Hejsenberg, kiu pretis kaj proponis al Hitler konstrui ĝin. Honoro al la aliaj, kiuj estis perfiduloj de propra nacio kaj lando. Per sia perfido ili savis la kulturon de Eŭropo, ili estis renegatoj de la naciismo, ili posedis la saman larĝan rigardon de la pensuloj kaj filozofoj de antaŭ 1800, eble ili memoris la profetaĵon de Goethe, ke iam la Germanoj falos en la manojn

de politikaj banditoj kaj eble ili volis iom rektigi tiun antaŭdiron, korekti ĝin.

Ni supre povas konstati du specojn de perfiduloj al propra naciismo : la unuaj, la armilkomercistoj, kies motivo kaj idealo estas la plenigo de la monujo, senskrupule, la aliaj riskas sian vivon por la bono de la homaro.

Ni vidas, ke la naciismo, komenciĝante kiel pozitiva faktoro, faktoro por pli da unueco en la mondo, faktoro, kiu finis la ĥaoson en trafiko, en monsistemo, en sistemo de mezuro, en ĥaoso de lingvoj, ĝi povas esti ankaŭ revolucia faktoro al liberiĝo de fremda aŭ interna subpremado. La koloniismo de la okcidento vekis fortan naciismon en la regataj kolonioj. Afriko nuntempe konsistas el 50 sendependaj ŝtatoj kaj regas iu nebula idealo de unu Afriko. Ni konstatas la neceson de la usona naciismo, same Izraelio ne povis defendi sin aŭ vivi sen la cionismo. Ni samtempe konstatis, ke la naciismo povas ŝpini blindigan reton antaŭ la mensa okulo rilate proprajn naciajn. En la granda Usono, kiu iam proklamis la Rajtojn de la Homo, multaj politikaj grupoj estis venenitaj kaj akiris falsitan moralan juĝon nur pro la honoro de la patrio. Usono kaj Izraelio ambaŭ montras, ke ĉiu nacia ŝtato emas plivastiĝi kaj grandiĝi koste de alia ŝtato. La naciismo facile iĝas imperiismo. Malgraŭ la fakto, ke la naciismo estas la ideologio de pli granda komuno de homoj, malgraŭ la fakto, ke ĝi superas urbismon, regionismon kaj provincismon, la nacia ŝtato kiel rezultato de la naciismo estas por ni SAT-anoj same egoista, same ĵaluza, same etmorala kaj etspirita kiel la 100 etcivitoj de la malnova Greklando.

Dum nia traktado de la naciismo kun ĝiaj tendencoj kaj ĝia moralo ni nur povus konkludi, ke ĝi ne estas kongruebla kun la esperantismo. La plej grandaj spiritoj de la homaro superis kaj kondamnis la naciismon : Sokrato, Lesing, Goethe, Zamenhof; aliaj pro internaciaj idealoj neis aŭ neglektis propran naciismon : Ŝiler, Dunant, Komenski.

Aliflanke kun bedaŭro ni devas konstati, ke aliaj grandaj spiritoj ne povis eviti ĝian venenan influon.

Ili defendis misagojn de propra lando per ŝajne pravigeblaj motivoj.

En 1877 la anarkiisto Kropotkin ĝoje aprobis militon de Ruslando kontraŭ Turkio, atendante, ke la liberigo de la balkanpopoloj de la turka regado subfosos la carismon. Oni povus demandi al si, ĉu la reĝimo de la Grandrusoj, kiuj subpremis aliajn popolojn en Ruslando, vere povus liberigi la balkanpopolojn.

La franco Rochefort (roŝfor), maldekstrulo en la Komuno de Parizo, ekzalte propagandis la naciismon en sia gazeto "La Patrio". Eĉ la socialista Jaurès ne estis tute libera de naciismaj makuloj. En 1910 li diris, ke Anglio kaj Francio ne subpremis koloniajn popolojn, "ĉar la du ŝtatoj estas inspiritaj de libero kaj justo".

Bernardo Shaw kaj H.G. Vels, ambaŭ nekonformistoj, pravigis kaj aprobis la burmiliton en Sud-Afriko, la rabon de libero de du malgrandaj popoloj. Ilia motivo estis ke tio devas okazi "pro la interesoj de la civilizacio". Eble ili imagis esti marksanoj, ĉar ankaŭ Marks defendis militon de civilizita lando kontraŭ barbara lando. Antaŭe ni jam menciis, ke ankaŭ germanaj socialistoj kiel Bebel estis konvinkitaj patriotoj. Ni nun estas atingintaj la finon de la traktado de la naciismo kaj ni nun provos difini la rilatojn inter naciismo kaj esperantismo kaj principe esplori la opiniojn de D-ro Zamenhof.

* * *

"Estas grado de kulturo, kie nacia malamo malaperas kaj kie oni staras certan distancon super nacioj kaj sentas la prosperon kaj mizeron de najbara popolo, kvazaŭ ĝi okazus al propra popolo" GOETHE

Multaj homoj, kiuj rigardas grandajn figurojn el la homa historio kaj ofte citas gravajn eldirojn de ili, ofte false imagas, ke tiuj pensuloj dum sia junaĝo neniam spirite kreskis kaj evoluis, neniam atingis aliajn juĝojn, neniam havus aliajn opiniojn kaj ĉiam havus rigidan, absolute inertan spiriton. Ni konstatos, ke ankaŭ D-ro Zamenhof en la komenco de la esperantismo havis tute alian rigardon ol poste kaj precipe rilate la naciismon.

Zamenhof 23-jara en 1882 tre verŝajne estis kaptita de la juda naciismo, la cionismo, sed ne ŝatis la ideon fondi judan ŝtaton en la Mez-Oriento, sed proponis aĉeti grundojn en Usono por fondi judan ŝtaton tie, ĉar juda ŝtato en Mez-Oriento nur kaŭzus grandajn malfacilojn dum en Usono neniu ĝenus ĝin. D-ro Zamenhof apartenas al tiu vico de pensuloj, en kiu la homa spirito ŝajne volas korekti sin kaj trarompi la kruston de inerto kaj tradicio kaj flugi al la estonto. Li memorigas nin pri Sokrato, kiu nomas sin mondcivitano, pri Volter, kiu tute ne sentis sin franco kaj pri Goethe, kiu daŭre skribis pri la germanoj, neniam pri "mia popolo" aŭ "nia popolo".

Ambaŭ, pastoro Slejer kaj D-ro Zamenhof, suriris la terenon de la homa spirito, kie ĝi estas plej konservativa kaj inerta, nome rilate la nacian lingvon. Kafka kun granda psikologia intuicio skribis : "Fermitaj vortoj estas pli nepenetreblaj ol dikaj panceroj. Malantaŭ la vortoj la homoj kaŝas sin kontraŭ la ŝanĝoj de la tempo. La frazo estas la plej forta bastiono de la malbono. Ni uzas kliŝojn meĥanbende, ĉar ni ne volas malkaŝi nin".

La juna Zamenhof spertis malamon inter nacioj kun malsamaj lingvoj en la cara regno kaj rigardis la nacian

lingvon kiel la ĉefan kaŭzon. Ni facile povas riproĉi D-ron Zamenhof pri tiu iom naiva koncepto, ĉar nia socipsikologia kono estas multe pli granda ol tiu de D-ro Zamenhof. Poste en 1906 en la kongreso de Ĝenevo, kiam li havis 47 jarojn, li montris alian rigardon pri tiu problemo. Li diris : "Ne la rusa gento kulpas en la besta buĉado en Bjalistoko, ĉar la rusa gento neniam estis kruela aŭ sangavida, nek la Tataroj aŭ la Armenoj kulpas pri la konstanta buĉado. Oni nun scias, ke kulpas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dissemataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj".

En la sama kongreso D-ro Zamenhof komencis ataki la uzadon de tradiciaj nomoj de ŝtatoj kaj vortojn, kiaj : "nacio, popolo" kaj uzi anstataŭe "regnanoj" kaj "landaro". Poste li kondamnos landnomojn, kiuj fakte kaŝas, ke unu tribo aŭ gento subpremas la aliajn, kiel ekzemple Ruslando, Anglio, Hispanio. Kvankam Ŝekspir diris, ke la nomo ne gravas, D-ro Zamenhof sentis, kiel idealisto kun delikata sento por lingvoj, ke la nomoj de landoj vualas la diferencojn sociajn kaj ekonomiajn en la lando, en la nacio. Verŝajne li ne havis la saman opinion kiel ni pri la trompa vorto "nacio". Kaze de milito kaj defendo de la"nacio", praktike la neposedantoj de la nacio defendas la posedojn de nobeloj kaj burĝoj, el kiu duo la lastaj estis la veraj propagandistoj de la naciismo. Se D-ro Zamenhof iam opiniis, ke la lingvo estas la plej grava faktoro, kiu distenas la popolojn, ni tamen devas esti dankaj pro tiu supraĵa koncepto, ĉar ni dankas al tio la naskiĝon de Esperanto.

Por popolo li preferas uzi la vorton "gento" kaj uzante ĝin, li verŝajne pensis pri la rusa regno, en kiu loĝis 60 popoloj kaj 16 nacioj. Jen montriĝas la praveco de D-ro Zamenhof, ĉar la terminoj "popoloj" kaj "nacioj" efikas tre konfuze, ĉar kio estis en la tiama rusa regno la diferenco inter "popolo" kaj "nacio" ? Ili ambaŭ kontraŭas la ideon de D-ro Zamenhof pri homa egalo kaj samrajteco. Jam en 1900 antaŭ la regado de la esperantomovado en sia traktaĵo "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia" D-ro Zamenhof jam komencis cerbumi

pri la problemo, kiun li vidis de post la 1-a kongreso en 1905. "Ĉu oni ne komencas erare koncepti, ke Esperanto kaj la esperantismo domaĝas al la nacia lingvo kaj al la naciaj sentoj de la homoj ?" Li samtempe devis batali kontraŭ la inerto de la homa spirito, kontraŭ la emo de la homo vuali la spiriton per rutinaj, kutimaj ideoj kaj tradiciaj konceptoj kaj rilate tion li tre facile estus povinta trankviligi tiujn timantojn pri la detruo de la nacia lingvo pro la esperantismo, ĉar montriĝas en multaj kazoj, ke la homoj ne facile kaj kun granda rezistemo cedas lingvon aŭ religion por akcepti alian. La homo ĝenerale estas kutimulo aŭ rutinulo, li timas la novan ideon. Ni trovas en tiu traktaĵo respondon al la jam menciitaj kritikantoj, kiun li verŝajne ne diris en iu kongreso. "Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompas al ni la kapon, ni neniel povas kompreni, en kio nome konsistus la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj naciaj lingvoj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo. Timi, ke lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn, estas tiel same ridinde, kiel ekzemple timi, ke la poŝto, kiu donas al la homoj malproksimaj unu de la alia la eblon komunikiĝadi, minacas neniigi la buŝajn interparoladojn inter la homoj."

Ĉi tie D-ro Zamenhof pruviĝas utopiisto kaj ne estas hontinde aŭ malsaĝe esti utopiisto. Grandaj figuroj havis utopiojn : Karlo la Granda, Tomaso Mor, Marks, Engels, Lenin, Johana d'Ark kaj aliaj. Sen utopioj la mondo neniam estus progresinta. Ridinda oni iĝas, se oni perdus tute la vidon pri la realo. D-ro Zamenhof ne ŝvebis super la realo, li klare vidis kaj certe ankaŭ pro siaj spertoj en la juna esperanto-movado, ke la lernado de Esperanto ne kreis anĝelojn, li vidis la mankhavan homan naturon kaj la laman homan praktikon en la realigo de bela idealo. En tiu frazo li subtaksis la amon, kiun homoj enkorigas por naciaj lingvoj kaj precipe por regionaj lingvoj kaj dialektoj. En la nord-okcidento de Francio 400.000 homoj loĝas, kiuj ankoraŭ uzas la nederlandan lingvon, surstrate, en butikoj kaj en la intima hejmo, sur teritorio, kie la franca lingvo estas la oficiala lingvo. La urboj ofte havas du nomojn, sed eĉ ekzistas vilaĝoj kaj urbetoj, kiuj

havas nur nederlandlingvan nomon, kie oni povus imagi esti apud Amsterdamo. Tiuj homoj estus tre malfeliĉaj, se ili estus devigitaj cedi tiun lingvon kaj pri la psikaj kialoj ni nur povus diveni. Eble la nederlanda lingvo vekas en ili certan nostalgion pri pasintaj tempoj, kiam ili uzis kaj aŭdis nur sian originan, nacian lingvon ; eble ili volas imagi por momento, ke ili vivas en tempo antaŭ ol la potenca pugno de Ludoviko 14-a puŝis la francan lingvon, fremdan lingvon al ili, kaj uzis la lingvon kiel rimedon por fortigi sian politikan influon en la sudaj Nederlandoj. En la okcidenta parto la franca lingvo ne detruis la originan lingvon, same kiel Esperanto ne detruus iun ajn nacian lingvon.
Tamen Ludoviko havis grandan sukceson. Ĝis 1900 la belga registaro uzis la francan lingvon. Dum la batalo por la rajtoj de la nederlanda lingvo estiĝis principo, forte malaprobita de D-ro Zamenhof, nome lingva ŝovinismo, tiam la pendolo svingiĝis al la alia flanko.

D-ro Zamenhof tute sobre kaj sen emocio diris, ke lingvo ne estas celo por la homoj, sed nur rimedo kaj li estis konvinkita, ke Esperanto ne ŝanĝas la homan karakteron. En la sama traktaĵo li skribis : "Se ni supozus, ke fariĝos iam kunfluiĝo de la homoj en unu ĉiuhoman popolon, en tiu ĉi "malfeliĉo" (kiel nomas ĝin la naciaj ŝovinistoj) estos kulpa ne la lingvo, sed la aliiĝintaj konvinkoj kaj opinioj de la homoj". Ĉi tie li tuŝas la psikan procezon en la homo al internacia konscio kaj tio pruviĝos pli malfacila ol la konkero en la spiritoj de la nacia konscio, kiu lasta havas la helpilon de la nacia lingvo, devige instruata en la lernejoj organizitaj de la ŝtato por superi la ĥaoson de la dialektoj. Por la internacia konscio ni do devas imagi internacian ŝtaton, ekzemple unuigitan Eŭropon kun deviga instruado en Esperanto. Ankaŭ D-ro Zamenhof tre verŝajne image vidis tion, ĉar li daŭrigis jene : "Tiam efektive la lingvo internacia faciligos al la homoj la atingon de tio, kio antaŭe estos principe decidita de ili kiel dezirinda : sed se la celado al kunfluiĝo ne naskiĝos ĉe la homoj memstare, la lingvo internacia per si mem ne volos altrudi al la homoj tian unuiĝon". Nia rimarko al ĉi tio estas, ke neniu aŭ nenio povus devigi la homojn al inter-

nacia konscio, sed se oni povas devige instrui oficialan, nacian lingvon al la homoj, oni ankaŭ povus fari el Esperanto iun devigan fakon en la lernejoj. Lerni la nacian lingvon estas por diversaj popoloj deviga afero kaj oni neniam aŭdas proteston de kimroj, skotoj, irlandanoj aŭ frisoj pro la fakto, ke ili devas lerni la anglan aŭ la nederlandan lingvon. Krome tiuj popoloj klare vidas, ke ili sen la oficiala, nacia lingvo en la praktiko atingos nenion, certe ne decan oficon. Ĉi tie praktikaj argumentoj cedigas ilin kaj ili povas konservi sian originan lingvon hejme kiel spiritan mondon kun emocioj, pri perdita sendependeco.

Ŝajne jam en 1900 en sia eseo pri Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia D-ro Zamenhof komencis prepari sin por trankviligi la postajn vizitantojn de la unuaj kongresoj, kiuj timis perdi sian nacian konscion aŭ patriotismon pro la aniĝo al la esperantismo. Li skribis : "La rilato inter la celado al lingvo internacia kaj nacia ŝovinismo estas sama kiel inter nacia patriotismo kaj amo al sia familio". Alivorte : lingvo internacia ne estas domaĝa per si mem al la naciismo, kiel ankaŭ la patriotismo, la pli vasta amo al la tuta lando aŭ nacio, ne estas domaĝa al la amo al pli malgranda komuno, la familio. D-ro Zamenhof eĉ inkluzivas la ŝovinismon, la plej fanatikan naciismon : "La plej varmega, blinda ŝovinismo ne devas escepti la celadon al lingvo internacia, ĉar la rilatoj inter celado al lingvo internacia kaj nacia ŝovinismo estas tiaj samaj kiel inter nacia patriotismo kaj amo al sia familio."

Oni povus filozofii pri la motivoj de ŝovinisto lerni Esperanton, oni ankaŭ povus filozofii pri la motivoj de la du francaj generaloj iĝi esperantanoj, pri kies membreco la neŭtralaj francaj esperantanoj tre fieris. Laŭ D-ro Zamenhof nacia ŝovinisto ankaŭ lernu Esperanton aŭ rajtas lerni Esperanton, ĉar oni ne povus malpermesi tion, ankaŭ ne al krimulo, egoisto aŭ malamanto de homoj, sed kiel li diris en la 3-a kongreso en 1907, "sed se li volas partopreni esperanto-kongreson, tiam la afero ŝanĝiĝas. Tiam li venas en landon, kiu havas siajn apartajn leĝojn, siajn apartajn morojn, kie regas la interna ideo de la esperantismo". En tiaj traktaĵoj pri ŝovinismo kaj

naciismo ni povas rimarki la pravon de la aŭstra filozofo Maĥ pri la malprecizo de la lingvo. D-ro Zamenhof uzas la vorton "patriotismo" kaj ni ĝenerale komprenas per ĝi "naciismo". Por ni la vico laŭ grado kaj intenso estas : patriamo-patriotismo-ŝovinismo.

***

Post la 1-a kongreso en 1905 D-ro Zamenhof forte konsciis, ke li nur per lingvo kaj iom da literaturo ne povas doni solidan unuigilon al la sinŝancela, hezitema, ne firme konvinkita juna esperanto-movado. Li klare vidis, ke tiuj etburĝaj intelektuloj kaj kelkaj laboristoj por la unua fojo enpaŝantaj tute alian fremdan mondon, estis ankoraŭ ŝargitaj de tradiciaj rutinaj, naciaj pensoj, de naciaj antaŭjuĝoj, de religiaj diferencoj, kiuj nur post peno povas konkeri novan kredon. Li komparis la unuajn esperanto-kongresojn kun la kunvenoj de la antikvaj hebreoj, kiuj trifoje jare kunvenis en Jerusalemo por vigligi al si la amon al la monoteismo. En la esperanto-kongresoj la vizitantoj devis pene liberigi sin de antaŭjuĝoj, certe de naciaj antaŭjuĝoj. D-ro Zamenhof klare vidis la sobran, senmistikan realon, la mankhavan, homan naturon kaj la timon de la homo akcepti ion tute novan. Li vidis, ke ne ĉiu esperantano estas idealisto, li vidis, ke diversaj rigardis la novan lingvon kiel utilan, praktikan rimedon sen iu ajn idealismo, li devis defendi la internan ideon kaj la homaranismon kontraŭ poŝtmarkkolektistoj, kontraŭ sendantoj de ilustritaj poŝtkartoj, kontraŭ negocistoj kaj eĉ kontraŭ aprobantoj de la interna ideo, sed kiuj anis ĝin nur en certa grado. Li devis komprenigi, ke esperanto kreas lingvan ponton kaj ke la homaranismo kreas ponton por ĉiuj homaj rilatoj.

D-ro Zamenhof konstatis, ke la homo estas mikso de sinkontraŭaj fortoj, ke la homo ne estas pura raciulo, nek pura prudentulo, nek pura mistikulo, sed ke apelante al la imagpovo de la homo, li povas levi la kongresanojn en mistika atmosfero, ke li, ne apelante al ilia racio kaj al ilia senvarma, sobra prudento, sed "per flugiloj de facila vento" kredigi ilin je la fina venko de la idealo

"por atingi la celon en gloro". Kiaj estus estintaj la unuaj kongresoj sen tiuj misteraj flugiloj ? Oni povus riproĉi D-ron Zamenhof krei tiun mistikan atmosferon, sed movado sen mistiko estas apenaŭ pensebla. Ankaŭ laboristaj movadoj bezonis ian mistikan kredon por firmigi la kredon je socialismo kontraŭ egoista, kapitalista realo. Tiam oni kantas : "Hej, laboristaro, al la finbatalo" aŭ "Iam venos la bela tago".

Samtempe D-ro Zamenhof provis transponti la malsamajn religiajn kredojn per sia homaranismo kaj diversaj katolikoj, protestantoj kaj judoj vidis ĝin kiel novan religion, kiun ili pli-malpli kun la esperantismo devis aniĝi kaj cedi sian Kriston aŭ sian Jehovon. Sed ili tiam ne bone legis aŭ aŭskultis D-ron Zamenhof. En 1906 li skribis : "La anoj de la homaranismo ne havas eĉ la plej malgrandan intencon krei novan religion, ili nur volas fari ponton, kiu povas pace ligi inter si ĉiujn religiojn ekzistantajn kaj poste iom-post-iom kunfandi ilin reciproke". La kredon de D-ro Zamenhof oni trovas en "La Preĝo sub la Verda Standardo" kaj en iu deklaracio li skribis, ke la ordonoj de dio estas enskribitaj en la koro de ĉiu homo. Per la homaranismo laŭ ni li provis propagandi apud la interna ideo iun moralan idealon de bono kun religia tendenco.

En nia traktado de la naciismo kaj al ĝiaj radikoj ni trovis, ke ekzistas tre intimaj rilatoj inter naciismo kaj religio, ambaŭ kunligas la homojn en komuna kredo, ambaŭ apelas al la kaŝita idealismo kaj sinoferemo de la homo, ambaŭ estas fonditaj sur la mistika kredo kaj honorado al iu mita prapatro. Ambaŭ uzas por montri sian identon certajn signojn kaj simbolojn. Rigardante la unuajn esperanto-kongresojn, oni povus nomi ilin kunvenoj de ĵus naskita nova nacio. Mistika kredo je la venanta venko, esprimita en himno, nova preĝo kaj la verda stelo kaj la verda standardo kompletigas la emblemojn, kiujn ankaŭ la naciismo posedas. Sed la limoj de la nova nacio estas la randoj de la tero, nova nacio, kiu ne diskriminacias laŭ lingvo, haŭtkoloro kaj raso, nova nacio kun toleremo, kiun oni povus nomi : homarnacio, mondnacio, nacia sen ĵaluzo, sen egoismo, sen perforto, sen konkeremo aŭ subprememo.

Tre verŝajne li devis aŭskulti multe da kritiko pri sia homaranismo, ne nur de ateistoj kaj tiuj, kiuj rigardis Esperanton kiel rimedon por praktikaj, senidealaj celoj, sed tre verŝajne ankaŭ de tiuj, kiuj, kiel li diris, "en Esperanto ĉiam vidas ideon kaj por ĉi tiu ideo multe kaj ame laboras... tio ŝajnas al mi tre stranga". Tion li jam diris en 1906. En 1907 la 21-an de aŭgusto post la 3-a kongreso en Cambridge en la Gild-Halo de Londono li devis defendi sin kontraŭ tiuj, kiuj timas perdi sian patriotismon per partoprenado en la esperanto-movado, aŭ de eksterstarantoj, kiuj kulpigis la esperantistojn pri esti malbonaj patriotoj. "La kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Laŭ la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas el malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni, laŭ ilia opinio, ne estas bonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro ! Dum la pseŭdopatriotismo, t.e. la genta ŝovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas. La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si".

Post tiuj vortoj D-ro Zamenhof image turnas sin al sia kara Litovujo : "Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Ho, patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon !" Ni jam rimarkigis pri la uzado de la vorto "patriotismo", ĉar klare ĉi tie D-ro Zamenhof celas defendi la "patriamon". Li montriĝas per sia kortuŝa imago pri la kara Litovujo, ke li ne estas patrioto, sed patri-amanto. Litovujo estis la lando, kie li pasigis sian junaĝon, li revekis per tio okazojn kaj sentojn el tiu plej sentema tempo de sia vivo, la plej senzorga kaj verŝajne la plej feliĉa kaj samtempe la plej emocia tempo de sia vivo. Ĝenerale oni nomas patrio nur la regionon aŭ urbon, kie oni spertis sian

unuan emocion de amo kaj spertas la amon de la gepatroj en la hejmo. En la germana lingvo ekzistas unu vorto por esprimi kaj priskribi patrion, gepatran domon kaj naskiĝregionon (heimat), naskiĝregionon. Kaj la amo al tio, de kiu neniu homo povas liberigi sin, estas despli forta, se oni ne plu loĝas en ĝi aŭ se oni elmigris al alia, fora lando. En tiuj vortoj do D-ro Zamenhof tute ne deviis de sia sennacia esperantismo. Sed la vorto "ŝovinismo" vekis en li tute aliajn pensojn kaj imagojn. Jam en 1906 en la kongreso de Genevo li fulmis kontraŭ ĝiaj anoj, la fanatikaj naciistoj. Li nomis ilin "mallumaj demonoj, nigraj semantoj de malpaco, en kies buŝo la sankta vorto "amo" malpuriĝas". La defendon de la "patriotismo" aŭ pli bone "patriamo" ni povas kompreni nur el la fakto, ke D-ro Zamenhof en la unuaj kongresoj staris antaŭ la malfacila tasko unuigi la junan, vundeblan esperanto-movadon, kiu konsistis el birdoj kun tute malsamaj plumoj. Unu el la partoprenantoj de la 1-a kongreso estis ekzemple S-ro Pollen, angla kolonelo,kaj tre verŝajne la du francaj generaloj ankaŭ partoprenis. Por ni, SAT-anoj, ili estas strangaj esperantistoj. Kiajn motivojn ili povus havi, ĉar ilia fako estas milito kaj uzi Esperanton por milito certe ne estis la ideo de D-ro Zamenhof. Ordinara soldato ne estas fakulo militista, li simple estas devigita partopreni militon.

En la unuaj kongresoj D-ro Zamenhof koliziis ankaŭ kun la mensa inerto de la homo kaj kun lia rutina pensado. Pioniroj de io nova renkontas nur "mokojn" kaj "batojn". Radikala propagando por la esperantismo, radikalaj konsekvencoj rilate religion kaj naciismon aŭ patriamon estus estintaj por la unueco de la juna, vundebla movado, katastrofa. Tion pruvas la ekzemplo de la pola D-ro Kaŝimir Bejne. Kiel entuziasma adepto li sidis sur la boato sur la lago de Ĝenevo dum la 2-a kongreso kaj aŭdinte tie diversajn opiniojn, li poste forlasis la movadon. Iuj diris, ke Esperanto estu nur por oficiroj, alia diris, ke ĝi estu nur por laboristoj, tria opiniis, ke ĝi estu nur por komercistoj, ktp. Tiu miskompreno pri la nova esperantismo dolore trafis tiun novan esperantanon kun tiom granda

lingva talento. Tiu ekzemplo konvinkas nin pri la preskaŭ senespera lukto de D-ro Zamenhof konservi la unuecon de la movado.

En 1913 li skribis plu pri tio, kion li nomis patriotismo. "Patriotismo mi nomas la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kiajn ajn devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas. La servadon speciale al la interesoj de unu gento aŭ la malamon kontraŭ alihejmuloj mi neniam devas nomi patriotismo. Mi konscias, ke profunda amo al sia patrujo kaj al sia hejmo estas afero tute natura kaj komuna al ĉiuj homoj". Ni ne povas liberigi nin de la imago, ke D-ro Zamenhof dum la skribado de tiuj linioj pensis pri cara Ruslando, politika kolektivo de multaj malsamaj gentoj kun la regado de unu gento, al kiu la aliaj devis servi. Por li la vera patriotismo estas parto de tiu granda, tutmonda amo. Gentan naciismon kaj etpatriotismon li malaprobis. Li vastigis hejm-amon al mond-amo.

Malgraŭ siaj idealistaj deklaroj pri patri-amo kaj patriotismo li kiel realista idealisto vidis kaj konsciis, ke homa praktiko kaj homa socio estas pli mankhavaj kaj komplikaj ol supraĵa rigardo povus sugesti, ke vera patriotismo preskaŭ ĉiam estas fortrudata de nacia egoismo. Li forte kritikis polojn kaj judojn rilate tion kaj ĝuste la popolojn al kiuj li apartenis. Li demandis sin, al kiu gento la lando fakte apartenas kaj li konstatis, kiom naciistaj la homoj estas. "Ho ve, ĉiu decidas nur tiel, kiel estas oportune por li. Pola patrioto diras ke en "Polujo" ĉiuj devas esti poloj, sed tiuj samaj poloj indignas, kiam en alia lando oni postulas, ke ili estu ne-poloj ; hebreaj patriotoj diras, ke en siaj landoj de naskiĝo ili devas esti plenrajtaj regnanoj kaj tamen en Palestino iam devas mastrumi nur hebreoj... ktp".

En sia traktaĵo "Gentoj kaj Lingvo Internacia" D-ro Zamenhof donas revuon pri la eblaj kialoj kaj kaŭzoj de malamo inter la gentoj : ĉu la kaŭzoj estas pure ekonomiaj, ĉu la kaŭzo estas fora disa loĝado, ĉu diferenco de korpo kaj haŭtkoloro, ĉu diferenco en menso kaj karaktero, ĉu malsamo de deveno, de sango, de raso. Zamenhof verkis tiun traktaĵon okaze de la Kongreso de Rasoj 1911 en Londono.

Li ne akceptis la suprajn faktorojn kiel la verajn kaùzojn, sed emfazas la lingvon kaj la religion. Ni tre facile nun povus kritiki D-ron Zamenhof rilate tiun koncepton, ĉar nuntempe ni estas pli riĉe armitaj per kono de la soci-psikologio, kiu ĵetas pli da klariga lumo sur la konduton de amasoj kaj popoloj. Aliajn faktorojn, kiuj laù ni ankaù forte influas la menson de popolo, geografian situon kaj klimaton D-ro Zamenhof ankaù neas. Li skribis ion rilate la plej persekutatan kaj malamatan rason, la nigrulojn. Li klarigas la antipation el la fakto, ke ili antaù nelonge ankoraù estis sovaĝuloj kaj poste sklavoj, ili konservis trajton aù sekvojn de longa barbareco. La tiel nomata rasa antipatio en la sentoj de la blankulo estas laù li la samaj sentoj de hereda aristokrato koncerne krudan kampulon. Tre optimisme D-ro Zamenhof kredis, ke ĉe la nigruloj ĉiuj trajtoj de estinta barbareco malaperos en evoluo al pli alta grado de civilizo. Ilia nigra haùto kaj iliaj dikaj lipoj ne plu forpuŝos nin.

Se ne ekzistus moderna soci-psikologio, la lastaj mo[illegible]milito estis al ni la instruistoj pri la komplika menso de la homo, pri la kaŝita subkonscio, la detruanto de la kulturo, kiu montris, ke moderna civilizita nacio konsistanta nur el blankuloj povas facile refali al barbarismo. Tiu barbarismo ne apartenas ekskluzive al homoj kun neblanka haùtkoloro. Laù ni la antipatio al iu fremda popolo loĝanta en la ŝtato de alia popolo estas ekonomia ; ĉinoj kaj judoj ekzemple pro diligento kaj intelekto vekis grandan socian ĵaluzon, negroj estis malamataj de laboristoj pro la malaltaj salajroj. Ankoraù en Aùstralio la fakasocioj devigas la registaron ne enlasi japanojn aù ĉinojn. La malamo pro haùtkoloro estas simple iluzio. Ni ankaù ne povus imagi persekutadon aù malamon nur pro la fakto, ke oni havas alian religion. En Libano la Mahometanoj malamas la Kristanojn pro ekonomiaj kaùzoj.

En sia optimismo pri ŝanĝo de la homoj kaj por forigi intergentan malamòn, D-ro Zamenhof image proponis eksperimenton, laù la nuna kono pri raso kaj sango, tute utopian : "Prezentu al vi, ke hodiaù ĉiuj hungaroj forgesis por ĉiam la lingvon hungaran kaj komencis paroli

nur la lingvon de la Germanoj : ĉu en tia okazo post 30 aŭ 40 jaroj ekzistus inter ambaŭ gentoj ia diferenco aŭ genta malamo ? Prezentu al vi, ke hodiaŭ ĉiuj hebreoj decidis forĵeti por ĉiam la hebrean religion kaj akceptis la religion de la popoloj, kiuj ilin ĉirkaŭas ; ĉu en tia okazo post 30 aŭ 40 jaroj ekzistus ankoraŭ ia diferenco inter hebreoj kaj ne-hebreoj, ia "hebrea problemo", ia antisemitismo aŭ filosemitismo ? Certe ne, ĉar per la ŝanĝo de la religio la tuta tiel nomata "hebrea raso" por ĉiam malaperus".

La fantazia plano de la Judoj estas pli realista ol tiu por la Hungaroj. Por ni ne ekzistas "hebrea raso", nur la semida raso. Kaj ni nun povas klarigi la nunan malamon inter judoj kaj araboj per la naciismo, ĉar kiam la granda araba imperio ekzistis ĉirkaŭ 1000 kleraj judoj okupis altajn poziciojn en tiu imperio, poziciojn de arto, kulturo kaj eĉ de regado. Sed ni jam notis, ke la homoj malfacile emas ŝanĝi religion aŭ lingvon kaj ŝajnas al ni, ke religion, kiu kredigas, ke oni estas la elektita popolo kaj speciale protektata de dio, la koncerna popolo ne facile cedos. Krome dum jarcentoj de malamo kaj kruela persekutado tiu religio estis por la judoj la morala spino, per kiu ili vivigis sin kaj konservis sian identon. Sed rezonante senpasie pri religio, en multaj landoj ĝi estas instruata, ofte pro ekonomiaj aŭ sociaj kialoj kaj se oni povas lerni religion, oni ankaŭ povus mallerni ĝin. En la plano forviŝi diferencojn inter germanoj kaj hungaroj ni renkontas la barieron de funda malsameco de raso, sango, deveno, menso kaj kulturo. La situo vekis inter la Hungaroj fortan senton de memsento kaj memidento. Ili loĝas inter du slavaj popoloj kaj estis regataj de germana popolo. Ili havas ne nur tute fremdan lingvon sed ankaŭ tute alian karakteron. Ilia naciismo estis multe pli bola ol tiu de la aliaj subpremataj popoloj de la aŭstra imperio. Tiu diferenco klare montriĝis en la revolucioj de 1848. Ili sukcesis venkbati la aŭstrajn armeojn kaj eltenis longan tempon. La kruela kaj perfida Franc Jozef monstre revenĝis sin kontraŭ tiu ekzemplo de idealismo kaj sinoferemo, tiel, ke eĉ la rusa caro naŭziĝis pro tio.

D-ro Zamenhof en siaj traktaĵoj kaj kongresparoladoj certe evitis politikajn temojn kaj ili certe estus estintaj maleblaj en la juna vundebla esperanto-movado. Li krome neniam volis vidi, ke gento ne estas unuo, sed dividita en sociaj klasoj. Li neniam diris ion aŭ skribis ion pri la batalo inter kapitalo kaj laboro. Lia lernanto Edmondo Privat en sia libro "Interpopola Konduto" pli mencias pri la dividiĝo kaj splitiĝo de popolo, nacio aŭ gento. Por li ankaŭ la 1-a mondmilito estis grava bato al la kredo je la homaro. Li spertis ne nur optimismajn esperanto-kongresojn, sed ankaŭ grandajn politikajn kongresojn internaciajn, kie oni akceptis belajn, esperplenajn mociojn kontraŭ eventuala milito. Lin ankaŭ morale trafis la cedo de la dua internacio kontraŭ la detrua psikozo de la naciismo. Sed D-ro Zamenhof en sia refuto de ekonomiaj motivoj por klarigi malamon inter la gentoj ne povas ne agnoski, kvankam nur preterpase, ke en gento ekzistas subpremantoj kaj subpremato j. Ni konstatas, ke li tamen trovis la "samgentan pugnon", kiun Privat ankaŭ mencias. Zamenhof skribis en la sama memuaro de 1911 : "Ĉu efektive pro kaŭzoj ekonomiaj ekzemple la milionoj da rusaj malfeliĉuloj malamas la milionojn da riĉaj malriĉuloj, dum, por defendi siajn rusajn premantojn kontraŭ fremduloj, ili tiel volonte verŝas sian sangon ? Kompreneble ne, ĉar la rusa soldato, mortigante ĉinan soldaton, scias tre bone, ke tiu ĉi lasta neniam farus al li tiom da malbono, kiom lia samgenta pugno". Do ĉi tie D-ro Zamenhof ankaŭ konfesas, ke la malamiko en propra lando meritas pli da malamo ol la nekonata t.n. malamiko de alia lando.

D-ro Zamenhof iam estis cionisto, sed respondo al invito partopreni fondon de Hebrea Ligo malkaŝas la evoluon de lia spirito kaj lian uzadon de pli klaraj vortoj, ne plu la nebulaj vortoj, kiaj : patriamo kaj patriotismo. Por la unua fojo en 1914 en junio li uzis la vorton "nacionalismo". Li rifuzis partopreni : "Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devas esti : krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj - kiel natu-

ra sindefenda reago - estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj ; sed se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta, ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj. Pro tio mi ne povas, malgraŭ la korŝiraj suferoj de mia gento, ligi min kun hebrea nacionalismo".

En sia letero al la diplomatoj en 1915 D-ro Zamenhof riproĉas al ili, ke ili post la milito simple komencos refaradi kaj refliki la mapon de Eŭropo. "Minacas danĝero, ke sur ia terpeco, kie ĝis nun mia gento estis mastro kaj aliaj homoj pli aŭ malpli estis tolerataj, morgaŭ eble alia gento fariĝos mastro kaj mia gento estos nur tolerata". Plu li konsilas al la diplomatoj forigi la gentajn nomojn de la lando kaj anstataŭigi ilin per neŭtralaj nomoj. Jam estis tiaj nomoj : Usono, Aŭstrio kaj la nomon Sovet-Unio li estus aprobinta. Feliĉe li neniam spertis la estiĝon de la pola ŝtato, unue ĝi ne akiris neŭtralan nomon kaj feliĉe li neniam spertis, kiel la idealisma pardoninda naciismo de subpremata nacio kaŝis ĝis la liberiĝo la saman havemon, la saman konkeremon, la saman egoismon kiel la aliaj naciaj ŝtatoj. Pollando sukcesis per la helpo de Francio ŝteli parton de Ukrajno, sur kiu loĝis 16 milionoj da rusoj.

***

> "Kiu, demandis Makbet, estas saĝa, mira, modera kaj kolera, lojala kaj neŭtrala samtempe ? Neniu."
>
> W. Shakespeare(ŝekspir)

En la tria kongreso en 1907 en Cambridge D-ro Zamenhof emfazis la neŭtralecon de la kongresoj. "Neŭtraleco ekzistas en ĉiuj internaciaj kongresoj ; sed dum tie la neŭtraleco estas simple afero de takto, ĉe ni ĝi estas la ĉefa principo". "Tial neniam ni devas paroli en niaj kongresoj pri aferoj speciale politikaj, kiuj apartenas al la diplomatoj, aŭ pri aferoj speciale religiaj, kiuj apartenas al ekleziuloj kaj filozofoj, ...

ĉar la verda standardo malpermesas al ni fari ion, kio povus ofendi tiun aŭ alian genton aŭ religian grupon". D-ro Zamenhof certe klare vidis, ke la homoj ne estas neŭtralaj. "Ĉiu privata esperantisto povas havi tiajn konvinkojn aŭ fari tiajn agojn, kiajn li volas". Kaj verŝajne li ankaŭ legis la vortojn de "Makbet". Ni vidas en tiu neŭtraleco ion nepre necesan por la juna movado kaj flanke de D-ro Zamenhof pli aferon de takto ol de principo. Akceptante la neŭtralecon kiel principon, li fakte malpermesis interŝanĝon de pensoj kaj opinioj, kio malhavigis al la kongresoj certan viglon, fakte oni ne rajtas paroli pri realaj aferoj, nek pri abstraktaj aferoj, kiaj religio kaj filozofio kaj tiam restis nur unu okupo de la spiritoj : droni en mistika, idealisma atmosfero.

Kaj tio signifis, ke la bato el la realo, la komenco de la 1-a mondmilito, estis despli forta kaj dolora al tiu malgranda bando de mondanoj, kiuj ĵus kantis : "La popoloj faras en konsento unu grandan rondon familian". Kiel la Grekoj levis sin super la realon per siaj tragedioj, la unuaj esperantistoj levis sin per kuna kantado de optismisma kanto, sed ankaŭ super la realon. Se la returniĝo en paca, ordinara realo estis malfacila, la eksplodo de tiu paco multajn morale detruis. Interna ideo kaj neŭtralismo, mistika kredo je la fina venko estis nur vezikoj kontraŭ la fera atako de la granda malamiko, la naciismo. Ni nur per granda peno kaj imagpovo povus vidi D-ron Zamenhof en la gloraj tagoj de la naciismo, la unuaj tagoj de aŭgusto 1914 kaj tio post la ĉeesto kaj gvidado de 8 kongresoj en atmosfero de homara harmonio. Sed li ne perdis ĉian idealismon. Li verkis la leteron al la diplomatoj. Li atendis Eŭropon kun socia egalo : "kiam ne plu ekzistos gento-mastroj kaj gento-servantoj, tiam ne plu ekzistos kaŭzo por intergentaj militoj. La malamon kaŭzas nur la ekzistado de gentoj premantaj kaj gentoj premataj, la blinda egoismo, fiero kaj kalumnieco de la unuaj, la natura reagemo de la lastaj".

***

Montriĝis post la 1-a mondmilito, kiam la esperanto-movado refloris, ke la neŭtralismo ne donis sufiĉe da nutro por komprenigi la idealisman flankon de la esperantismo, la interman ideon, kiu devas kredigi al egalo kaj justo por kiu ajn popolo aŭ homo. En neŭtrala kongreso en 1938 en Londono ni renkontis svedan esperantistinon, vestitan en ĉarma, kredeble regiona kostumo. Ŝi fakte volis diri : "Rigardu, mi estas esperantistino, sed bone rigardu, mi estas sveda esperantistino, mi ne volas esti egala al la aliaj senkoloraj kongresanoj, mi volas elstari kaj aparte altiri la atenton." Iam D-ro Zamenhof diris pri ne-altrudo de apartaj gentaĵoj. Tiu svedino agis kontraŭ la interna ideo. Sed ĉu tio nun vere gravis, ŝi insultis neniun, ŝi vundis neniun, kontraŭe, ŝi donis pli da koloro al la kongreso, ŝi aspektis pli ĉarme kaj pli romantike. Kaj se oni demandus al ni, ĉu ni ŝatus vidi esperanto-kongreson kun lokaj aŭ naciaj kostumoj, ni ne tuj dirus ne. Ĉu oni povus imagi kongreson kun skotoj en ĉarmkoloraj kiltoj kaj biretoj, kun bavaroj en ledaj pantalonetoj kaj plumhavaj ĉapeloj, inoj de Volendamo kun iliaj graciaj pintaj puntĉapoj ? Tia kongreso estus laŭ arta vidpunkto ia folklora festo, sed ne esperanto-kongreso, kie oni faru ian nacian distingon.

Oni ne povus postuli de la esperanto-movado mortigi la naciismon en la mondo, sed en propraj vicoj ne estu ia ajn naciismo. Sed jam antaŭ 1938, nome en 1933 okazis neŭtrala kongreso en Kolonjo, kiu estus kaŭzinta al D-ro Zamenhof mortigan korbaton. Por multaj germanaj neŭtralaj esperantistoj la interna ideo estis nur baloneto, facile trapikebla. Kiel ili diris rilate sian religian kredon : "Unue mi estas germana kaj poste mi estas katoliko, protestanto aŭ socialisto", ili diris same rilate sian esperantistecon. Anstataŭ la verdan stelon ili havis la svastikon, anstataŭ "La Espero"n ili komencis kanti la Horst-Wessel-kanton, anstataŭ la verdan standardon ili sekvis la nacian standardon, anstataŭ obei la noblajn sugestojn de D-ro Zamenhof, ili obeis la malicajn komandojn de S-ro Geŭbels, kiu laŭ aspekto tute ne reprezentis la belan, germanan rason, li estis kripla skeleto kun cerbo, tute ne samis aŭ similis la blondan Sigfrid.

Kaj tiuj brunuloj de Kolonjo uzis lingvon, iniciatitan de judo, de nobla judo. Ni volas akcepti, ke tiuj esperantaj naci-socialistoj ne antaùvidis tion, kio okazis poste en la patrio de D-ro Zamenhof, krome neniu sciis, ke sukcesis SS-grupo ekstermi la tutan familion Zamenhof, tiel, ke nur la nomo restas sur kelkaj tombŝtonoj. S-ro Geùbels lerte eluzis tiun kongreson de Kolonjo por montri kia libera lando la nova Germanio estis. Edmondo Privat skribis, ke laboristoj bedaùris post la 1-a mondmilito, ke ili ne pli frue faris revolucion, sed de tiuj germanaj, neùtralaj esperantistoj ni neniam aùdis iun vorton de bedaùro esti servintaj la hitlernaciismon. Oni ĉiam nur mencias tiun katastrofan moralan falon de germanaj esperantistoj, sed certe en aliaj landoj ankaù esperantistoj falis en la saman puton, ne per la vorto "naci", sed per la loga vorto "socialismo". En Nederlando pompis, vantis kaj propagandis S-ro Adelberto Smit. Li reprezentis en la neùtrala esperanto-movado la Naci-Socialisman Ligon. Li strebis al sendependa, libera Nederlando en la germana vivospaco. Li kombinis naciismon kun esperantismo. Kion li poste kredis, kiam la germanaj naci-socialistoj malpermesis la esperantismon kaj la faŝista alo de la movado komencis ekstermi la popolon, al kiu la iniciatinto de la esperantismo apartenis, ni nur povus imagi. Kiel S-ro Smit savis sin el la dilemo stari en majo 1940 kontraù iu vizitinto de la kolonja kongreso, ĉar tiam li estis devigita defendi "liberan, sendependan Nederlandon" kontraù iu, kiu anis la saman kredon internacian je la homaro. Kia monstra konsekvenco, se esperantisto samtempe estas naciisto.

La krucvojaĝo kontraù la komunismo fare de Hitler kreis por multaj burĝaj, konservativaj, kontraùsocialistaj rondoj en ĉiuj landoj de Eùropo ian dilemon. Ili elkore plene simpatiis kun Hitler, ĉar li promesis detrui la komunismon kaj por emfazi tion li prefere uzis la vorton bolŝevismo, kiu vorto havas pli timigan efikon. En Francio aperis libreto, verkita de Johano Salan, eksdiplomato, kiu pro naùziĝo forlasis la servon kaj li menciis la konsternan fakton, ke komercistoj, entreprenistoj, industriistoj sabotis la liveradon de materialo

necesa por defendi Francion kontraŭ la armeoj de Hitler, dum samtempe la pli malaltaj rangoj kaj laboristoj petegis pri tiu liverado. S-ro Salan malkaŝas antaŭ ni, ke la rondoj, kiuj propagandas la naciismon, kiuj daŭre legas kaj abonas naciistan gazeton, kiuj havas grandajn materiajn interesojn en la kara patrio, preferas la okupon kaj elŝteladon de propra lando, kondiĉe ke Hitler detruu la komunismon, dum laboristoj, etburĝoj, kiuj ne havas grandajn materiajn interesojn, pretas batali por la kara patrio, en kiu ili posedas nenion.

Al tiuj konservativaj rondoj de komercistoj kaj industriistoj oni almenaŭ povas riproĉi, ke ilia naciismo estas tute falsa, ili verŝajne posedas altan banksaldon en Svisio. Sed la sama dilemo estiĝis ankaŭ inter veraj, politikaj naciistoj de Francio. Ekzistis monarki-faŝista movado. Konataj membroj estis : Daudet, Maraud kaj Céline, ĉiuj konataj antisemitoj. Unu el ili verkis broŝuron "Kial morti por Dancigo?".

Novembron 1938 Maulnier (molnie), teoriisto de la movado skribis en la gazeto "Combat" : "Franca venko estus ankaŭ venko de la principoj, kiuj kondukus al la detruiĝo de Francio kaj al la detruiĝo de la civilizacio mem". Tiuj reakciaj rondoj vere preferis malvenkon de Francio, ĉar glora venko de la patrio detruus la nuran bastionon, la nuran aŭtokratan ŝtaton, kiu povus haltigi la marŝon de la komunismo. Nun la mirindaĵo estas, ke tiuj fanatikaj naciistoj, politikaj naciistoj, subite en la t.n. intereso de la civilizacio estiĝis sennaciistoj. Ili deklaras, ke konsekvenca franca naciismo helpus al la detruo de la civilizacio de Eŭropo kaj tiu voĉo venas el lando kulture la plej riĉa de Eŭropo kaj de la mondo. Ili estis tiom blindigitaj faŝistoj, ke ili ne povis vidi, ke venko de Hitler estus venko de la barbarismo. En britaj konservativaj rondoj oni opiniis, ke malvenko de Hitler kreskigos la revoluciajn fortojn en Eŭropo. Nia demando estas : Ĉu tiuj francaj defetistoj iam estis punitaj ? Ordinara soldato, kiu predikus la saman malobeon por batali kaj defendi la patrion certe estus punata. La teniĝo de la burĝaj industriistoj ankaŭ kaj dum la milito kun plena kaj simpatia kunlaborado kun la germanaj okupantoj forlogis generalon de Gol al la vortoj : "Jes,

sinjoroj, nun vi estas ĉi tie, sed kie estis vi dum la milito ?"

Nun post la detruo de Germanio estiĝas malgraŭ teruraj spertoj iu mistika naciismo tie. Iu neo-faŝista junulgrupo nomas sin filoj de Votan, la mita dio de Germanio. Ili trovis novan religion kun malnova pagana dio, por ili anstataŭanto de la kristana dio.

* *
*

Fine ni volas resumi kelkajn opiniojn de D-ro Zamenhof rilate la naciismon, por montri, ke li atentis kaj sekvis la kreskon de la naciismo en Eŭropo.

1900 :

El kio konsistus la malfeliĉo por la homaro, se ian tagon ne ekzistus jam plu nacioj kaj naciaj lingvoj ?

1906 :

Malaperu la barbartempa kutimo nomi landon per la nomo de unu el la gentoj.
La koncerna popolo ne kulpas, nur aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter la gentoj.

1907 :

La pseŭdo-patriotismo, t.e. la genta ŝovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu detruas ĉion en la mondo, la vera patriotismo estas parto de tiu granda, tutmonda amo, kiu konstruas ĉion kaj feliĉigas.

1913 :

Profunda amo al sia patrio kaj al sia hejmo estas afero tute natura kaj komuna al ĉiuj homoj. Lingva ŝovinismo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de malamo inter la homoj.

1914 :

Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon.

Konsidere al la forta kresko de la naciismo kaj al ĝia fortiĝo, grandparte kaŭzita de la unuiĝo de Germanio,

kio vekis kaj fortigis la naciismon en aliaj landoj, precipe ĉe ĝiaj najbaroj, tiuj tezoj de D-ro Zamenhof sonis tiam jam tre radikale. Se oni povus riproĉi al li, ke li rigardis la naciismon tro unuflanke, li estis unu el la unuaj instruistoj en Eŭropo, kiu donis lecionojn pri rigardi, pensi kaj juĝi monde, kiun poste SAT transprenis.

Ni volas fini per kortuŝa okazo dum la 2-a mondmilito, kiu pruvas, kiel malhoma, kia etiketa kaj artefarita la naciismo vere estas, ke ĝi estas komparebla kun jako, kiun oni en butiko aĉetas.

Heinz, germana junulo, venis el regiono, kie oni ankoraŭ plej ofte parolas tipan dialekton kaj en la praktiko apenaŭ la germanan elitan lingvon. En 1944 li devis defendi la trian regnon en Francio, laborante ĉe la Atlantikmuro. Post la invado en junio lia sekcio kaptis kelkajn usonajn soldatojn. Ili kolektiĝis en korto kaj dum kelka tempo neniu diris ion. Subite Heinz aŭdis el la buŝo de unu usonano la frazon, diritan en la dialekto de sia regiono : "Nun, diru, kiam vi mortpafos nin ?" Tiu usona soldato en alia uniformo kaj kun aliforma kasko estis Franz, iam najbara kamarado de Heinz. Li 10 jarojn antaŭ la milito elmigris al Usono por edziĝi kun la knabino, kiun li amis, sed kion liaj gepatroj malpermesis. Malfacile imagebla por ni estas la mieno de Heinz, certe plena de konsterna surprizo, kiam li aŭdis sian amatan hejmlingvon el la buŝo de usona malamika soldato. Sed li respondis : "Kion vi diris, ĉu mortpafi ? Ni eĉ ne rajtas tuŝi vin per unu fingro". Jen ekzemplo de malhoma, malracia naciismo. Du homoj, kiuj havas ĉion komunan : devenon, lingvon, rason, popolon, regionon, sed pasporto kaj uniformo devigas ilin malami kaj mortigi unu la alian. Pasporto kaj uniformo deklaras, ke ili estas malamikoj en militsituo. Eble la du junuloj estis katolikoj aŭ protestantoj, ambaŭ tiam anis religion, kiu havis la humanismon de Jesuo en la programo, sed kio momente devis cedi al la malhoma komando de la nacia ŝtato.

*******

Ĉe la broŝurservo de S.A.T.
**************************

(Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut)

Roza Luksemburg : Naciecaj problemoj +

Imperiismo, naciismo kaj socialismo.

kaj jenaj tekstoj de E. Lanti :

* Absolutismo (prelego)
* Adamaĵoj (originalaj artikoloj)
* La laborista esperantismo
* Vortoj de Kamarado E.Lanti

Ĉe S.A.T.
********

(67, avenue Gambetta, F 75020 Paris)

Historio de S.A.T. (1921-1952)

kaj jenaj tekstoj de E. Lanti :

* For la neùtralismon !
* Manifesto de Sennaciistoj kaj
  Dokumentoj pri Sennaciismo.

Elĉerpita : Naciismo, de E. Lanti.

Directeur de publication et imprimeur C.Baudé F 47340 Laroque-Timbaut
CPPAP n° 58651. Dépôt légal : mars 1981